

esperanto

februaro 1968

61-a jaro

n-ro 747 (2)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

Goya



ESPERANTO

revuo internacia

ihavo

- 13 Madrid atendas vin (Pompilio)
Estraraj diskutoj en Rotterdam
 - 14 Persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo (CED)
 - 16 En la Muzeo El Prado: Goya (Juanes)
 - 19 Intervjuo kun la redaktoro de Biblia Revuo
 - 20 Enkonduko en la libroskiencon (4) (Haupenthal)
 - 21 En universitato — Por kaj per Esperanto
 - 22 Lerneja bulteno n-ro 12: Grava decido de la pola ministerio
 - 24 Libroj plej vendataj en 1967
 - 25 Recenzoj
 - 26 Ricevitaj eldonaĵoj
Nekrologoj
 - 27 Mallonge
 - 28 La Juna Vivo
 - 29 53-a Universala Kongreso, Madrid, 1968
Internacia Ekzamena Komisiono
 - 30 Maŭra arto en Hispanujo
La poŝtmark-kolektado
20-a Kongreso de IFEF
Memoriga kalendaro
 - 31 Oficiala informilo n-ro 409:
La Internaciaj Konkursoj 1967 — rezulto
 - 32 Danko pro bondeziroj
Anoncetoj
- Portreto de Goya, pentrita de lia disĉiplo
Vicente López
- 16 (-18) Muzeo El Prado, Madrid
 - 24 Verlag Foto-Stille
 - 29 Mamegam
 - 30 "Welt auf Reisen"

vrila bildo

Idojn liveris

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPE-
RANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88
Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1968): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj. Unuopa numero: 1,— gld.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en ĉ. 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado, Postbus 412, Eindhoven, Ned.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk 1, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

D-ro Peter Zlatnar, estrarano pri kongresoj, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Germarkenstr. 146, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

Jam de pluraj monatoj la Loka Kongresa Komitato de la 53-a Universala Kongreso de Esperanto estas laboranta por konstrui la fundamentojn de la Kongreso mem. Kiel por konstrui solidan domon necesas doni maksimuman atenton al ĝia bazo, tiel por organizi sukcesan kongreson la plej grava punkto estas la unuaj preparlaboroj.

Fiksi la diversajn kongresajn ejojn, aranĝi kiel eble plej komfortajn loĝeblecojn por la kongresanoj, elekti allogajn kaj interesajn celojn por ekskursoj, fari la unuajn kontaktojn por aranĝi interesan programon, speciale antaŭvide al la Arta Festivalo: ĉio ĉi — kaj aliaj — estas tio, kion ni konsideras la bazo de U.K. Kaj ĉio estas en la nuna momento praktike fiksita, tiel ke ekde nun la fortoj de la organizantoj povos sin direkti al la detaloj de la preparlaboroj.

La Kongresejo, kiel vi povas legi kaj vidi en alia parto de tiu ĉi gazeto, estos la "Domo de la Sindikatoj". Ĝi estas granda, relative moderna konstruaĵo, en kiu tre ofte okazas naciaj kaj internaciaj diversspecaj kongresoj. Pro sia situo — en la centra parto de la urbo, vidalvide al la fama muzeo "El Prado", tre proksima al unu el la ĉefaj fervojaj stacidomoj kaj al stacio de la subtera fervojo — ĝi estas rekte kaj facile atingebla de ĉiu parto de la urbo.

Madrid mem ne bezonas specialan prezenton aŭ rekomendon. Kun siaj larĝaj bulvaroj, kun siaj imponaj konstruaĵoj ĝi donas ideon de io grandioza, sed samtempe netimiga — kontraŭe. Kaj ĝiaj belegaj parkoj donas al ĉiu la eblecon izoliĝi de la tumulta ĉiutaga vivo kaj ripozi en freŝa kaj freŝiga aero. Agrablege estas sidi en la vesperaj horoj ĉe unu el la miloj da kafejaj tabletoj, kiuj je ĉiu paŝo troviĝas sur la tro-

tuaroj de Madrid. Tiu vidpunkto estas la plej bona por bone kaj komplete observi la madridanojn — kaj por ĝui relative malmultekoste bongustajn trinkaĵojn.

Ankoraŭ malpli kosta

Koncerne la malmultekostecon estas interese atentigi ke, por turisto, nuntempe restado en Hispanujo fariĝis ĝenerale malpli kosta ol antaŭe, kiam jam ĝi estis relative malpli kosta, ol ĉe aliaj eŭropaj landoj. Tio, kiel ĉiuj certe scias, ne dependas de malaltigo de la prezoj, sed de la devaluto de la peseto. Por doni konkretan ekzemplon, ni diru, ke oni povas loĝi en hotelo en Madrid pagante de 160 ĝis 46 stelojn, laŭ la kategorioj luksa ĝis turista.

Ĉar la U.K. okazos en Madrid, ni plejmulte parolis pri tiu ĉi urbo. Sed Hispanujo ne estas nur Madrid, kaj por doni al la kongresanoj la okazon konatiĝi ankaŭ kun aliaj partoj de la lando, estas organizitaj ekskursoj al "El Escorial", al Segovia kaj al Toledo.

Krome la junuloj povos konatiĝi kun Tarragona, kie okazos, antaŭ la U.K., la TEJO-Kongreso, kaj tiuj kongresanoj, kiuj intencas resti pli longe en Hispanujo, povos partopreni la Postkongreson en Zaragoza.

Preskaŭ 800 personoj ĝis nun aliĝis al la 53-a Universala Kongreso de Esperanto. Tio signifas, ke jam tiom da esperantistoj intencas ĝui Universalan Kongreson en la hispana ĉefurbo. Multaj el ili jam konas persone Madrid. Malgraŭ tio, aŭ pli bone ĝuste pro tio ili intencas al ĝi reiri.

Ĉu alia pli forta rekomendo, por ke ankaŭ vi kaptu la okazon por ĝui novan sperton?

G. G. Pompilio, K.K.S.

ESTRARAJ DISKUTOJ EN ROTTERDAM

En 1969: Helsinki

La 6-an de januaro okazis en la Centra Oficejo de UEA laborkunsido, kiun ĉeestis la prezidanto, vicprezidanto Wensing, estraranoj Woessink kaj Jaumotte, la direktorino, vicdirektoro kaj KKS.

La ĉefaj interparoloj koncernis kongresojn. Oni fiksas la buĝeton kaj grandan parton de la programo de la 53-a Universala Kongreso en Madrid (vidu la Oficialan Komunikon sur p. 29.) Por la posta jaro, 1969, oni definitive akceptis la inviton de Helsinki. La elekto de norda lando estos certe aparte bonvena post pluraj kongresoj en pli varmaj klimatoj. Lige kun la U.K. estas antaŭvideblaj antaŭkongresa seminario en Svedujo, eble en Frostavallen, kaj postkongresa ekskurso al Leningrado, kvankam tiuj lastaj du aranĝoj ne estas ankoraŭ certaj. La 54-a U.K. en Helsinki okazos de la

26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1969.

Revenante al la nuna jaro, okazos en Grésillon, Francujo (kiu por multaj kongresanoj troviĝas survoje al Madrid) speciala seminario sub aŭspicio de UEA, kun la celo enkonduki seriozan diskuton pri la edukado de gvidantoj de la movado. Prelegos i.a. prof. Lapenna, s-roj Becker kaj Jaumotte kaj d-ro Zlatnar. Datoj: 22-29 julio.

Pri eldonaĵoj: la Estraro notis kun granda kontento, ke la usona fondaĵo Institute for International Order decidis subvencii la novan revuon de CED "La Monda Lingvo-Problemo" per unufoja sumo de \$ 1000. La Estraro krome decidis akcepti por la serio Oriento-Okcidento la japanan libron "El la vivo de Syunkin" de Zyun'itirô Tanizaki.

La lasta grava decido koncernis revigligon de la Eŭropa Kampanjo sub gvido de d-ro Herrmann.

En la speciala plano de agado, kiun starigis al si la Centro de Esploro kaj Dokumentado okaze de la Jaro de Homaj Rajtoj 1968,¹ esploroj pri malobservoj de la lingvaj rajtoj de la homo okupas gravan lokon. Antaŭjuĝoj, diskriminacio kaj rektaj persekutoj bazitaj sur lingvaj diferencoj, lingva imperiismo kaj ŝovinismo, kultura genocido — ĉiuj ricevos apartan atenton kaj pri ĉiuj aperos artikoloj en la revuo de UEA kaj apartaj dokumentoj de CED. La plej gravajn rezultojn de la esploroj prezentos la nova revuo de CED "La Monda Lingvo-Problemo", aperonta ekde decembro 1968.

En tiu ĉi artikolo temas pri nur unu aspekto de la lingva diskriminacio: pri persekutoj (kutime de registaroj) kontraŭ la Internacia Lingvo. En la lastaj jardekoj tiaj persekutoj aperis en multaj landoj kaj en multaj formoj: jen malpermeso de organizaĵoj, eldonaĵoj kaj instruado, jen elficigo, aresto, eĉ mortigo de aktivuloj por Esperanto, jen minacoj, traserĉoj, konfiskoj de korespondaĵoj kaj presaĵoj. Ne temas pri nure historia superrigardo — ankoraŭ en tro multaj landoj ekzistas persekutoj en tiu aŭ alia formo. Ankaŭ tiun ĉi numeron de "Esperanto" konfiskos tiu aŭ alia cenzurejo.

Personoj tro kutimiĝintaj al ŝtata premo kaj arbitraj intervenoj povas eĉ dubi, ĉu ekzistas rajtoj je lingvouzo. Jen la esencaj linioj el la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj:

Artikolo 19. "Ĉiu havas la rajton ... peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn *per kiu ajn rimedo* kaj senkonsidere pri la landlimoj."

Artikolo 20. (1) "Ĉiu havas la rajton je libereco de pacema kunvenado kaj asociiĝo."

Kaj en Artikolo 2 estas jam nete dirite: "Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj ... validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ ... lingvo ... aŭ alia stato."

Kompreneble, persekutoj ne ĉiam havas historie konstateblan motivon. Se iu polico arestas homon sen klarigo de la kaŭzo, oni povas nur konjekti, ĉu kulpis lia politika aparteno, lia raso, lia lingvo aŭ alia propraĵo. Tiaj dubaj kazoj estas laŭeble ellasitaj el la ĉi-suba kompilaĵo. Necesas krome atentigi, ke iuj detaloj menciitaj povas esti eraraj, kvankam laŭeble ĉiuj referencoj estas zorge kontrolitaj. CED anticipe bonvenigas ĉiujn korektojn aŭ kompletigojn.

Historion de persekutoj kontraŭ Esperanto oni povus komenci jam ĉe la komenco — en Rusujo en la 19-a jarcento. Tio tamen apenaŭ havis hodiaŭ vivan intereson. Cetere, la plej sovaĝaj persekutoj klare apartenas al pli moderna epoko. Dank' al la esplorkomitatoj de Ulrich Lins, ni havas hodiaŭ klaran kaj abunde dokumentitan bildon pri la sorto de la Internacia Lingvo en la nazia Germanujo, en ĝiaj landoj-aliancinoj kaj en la landoj de ĝi konkeritaj.² Mallonge, la nazioj rigardis Esperanton

kiel ilo de juda komploto por akiri regpotencon, kaj la Esperanto-organizaĵojn kiel mond-koncepte malamikaj al naziismo. Ili konsekvence faris ĉion eblan por ekstermi la lingvon kaj movadon. La kompleto de la ĵus menciita studo permesus komenci ĉi tiun historion ĉirkaŭ la militfino en 1945, se la radikoj de la postmilitaj eventoj ne troviĝus jam en la tridekaj jaroj...

"Frue, Esperanto tre sukcesis en Soveta Unio. Ekde proksimume 1937 ĝis la morto de Stalin, oficialaj rondoj konsideris Esperanton 'burĝa internaciismo kaj kosmopolitismo', kaj ĝi falis sub severan malaprobbon." Tiel Marjorie Boulton en la biografio "Zamenhof" (1962). Kiel severa estis tiu malaprobo, rakontis ruso en la 39-a Kongreso de SAT en 1966: "... mi travivis la eksterlegigon en Sovetio de SAT kaj SEU." (SEU = Sovetrespublikara Esperantista Unio) "Membroj de internacia spiona organizo sin kaŝas sub nomo de SEU", dekretis la tiamaj regantoj. Mi pasigis 18 jarojn en malliberejoj. Mi estis bonŝanca, ĉar ... miaj gvidantoj estis mortpafitaj."

En 1940 — laŭ sovetaĵ dokumentoj cititaj en londona gazeto "The Observer" (25 mar 56) — Ivan Serov de NKGB ricevis la taskon forigi "kontraŭsovetajn elementojn" el la baltaj respublikoj al malproksimaj regionoj de Soveta Unio. El dek kategorioj de tiaj "kontraŭsovetaj elementoj", la kategorio 7 estis: "Personoj, kiuj korespondas kun eksterlando, ekz. esperantistoj kaj filatelistoj".

La efikoj de stalinismo en la antaŭmilitaj jaroj restis limigitaj de la sovetaĵ landlimoj. Sed ekde la militfino la Esperanto-movadoj de orient-eŭropaj ŝtatoj ĝenerale suferis similan sorton. Tipa estas la klarigo de A. Malík en 1950 en Ĉeĥoslovakujo, kiam la tiea movado mem troviĝis en siaj lastaj agonioj sub stalinisma premo: "Estas ja konate, ke Sovetunio multe favoris Esperanton, ĝis kiam montriĝis reakcio en la rondoj de sovetaĵ esperantistoj, kiam oni konstatis, ke esperantistoj en Sovetunio — ne ĉiuj — helpis al spionada servo kontraŭ la ŝtato. Kie estas do la kulpo, ke en Sovetunio Esperanto-movado velkis kaj mortis? La kulpo estas en la vicoj de la sovetaĵ esperantistoj, kiuj stariĝis kontraŭ la reĝimo." El orienta Germanujo, R. Zimmermann aŭdigis similajn argumentojn por pravigi la subpremon de tuta lingvo pro la eventualaj agoj de iuj ĝiaj parolantoj, kvankam laŭ la sama logiko estus necese subpremi la germanan, rusan kaj aliajn lingvojn, se ne ĉiujn!

¹) Vidu decembro 1967, p. 169.

²) Ulrich Lins: Esperanto dum la Tria Regno. Germana Esperanto-Revuo, 19-a jaro 1966 jul-aŭg. n-ro 7-8 p. 76-78; okt. n-ro 10 p. 99-101; 20-a jaro 1967 jan. n-ro 1 p. 5-8.

Proksimume en la sama tempo, kiam Stalin klopodis ekstermi Esperanton, komenciĝis en Hispanujo la interna milito, kiu daŭris ĝis 1939. Kvankam dum la milito mem aperis diversaj bultenoj en la Internacia Lingvo, ĝi tamen markas la komencon de longa periodo, en kiu la lingvo restis suspektata. La ĉefurbo, ekzemple, devis atendi 14 jarojn (ĝis 1951) por denove havi kurson de Esperanto. Oficiala malpermeso, tamen, neniam ekzistis. Tuj antaŭ la Dua Monda Milito la cenzuro permesis eldonon de Esperanta lernolibro, kaj en 1946 povis jam komenciĝi radio-kurso. En la urbo Tarrasa, aliflanke, oni rifuzis permeson por publika kurso en tiu sama jaro... Entute restas la impresoj, ke temis pri unuopaj aŭtoritatoj kun propraj antaŭjuĝoj bazitaj, sendube, sur la fakto, ke la kontraŭfaŝisma tendaro en la interna milito uzis Esperanton por sia informado internacia.

La situacio ŝajne pliheliĝis en la tuj sekvaj jaroj per la laŭleĝa fondo de Hispana Esperanto-Federacio kaj per la oficiala permeso por Esperanto-kurso en la universitato de La Laguna ekde 1947. Sed "Esperanto" de februaro kaj marto 1949 jam devis raporti retropaŝon: "Ĉi tiu gazeto jam dufoje informis pri Esperanto-kurso en la universitato de La Laguna... nun ĝi estas malpermesita. ... Esperanto en tiu regiono estas malbone rigardata de la provincaj politikaj aŭtoritatoj, kiuj ligas al ĝi nebulajn ideojn pri internaciismo kaj maldoktrino politika." "La dekanato de la Kemia Fakultato, D-ro J. Maynar Duplá, kuraĝis publike kritiki la agon de la rektora moŝto, kiu ĉesigis la kurson. La rektoro... proponis al la hispana ministro de Publika Instruado, ke li eksigu D-ron Maynar Duplá el lia posteno, kiel dekanato de la Kemia Fakultato. La ministro akceptis la proponon..." Nur en 1952 la Internacia Lingvo povis denove eniri la universitatan programon. Hodiaŭ, kiel konate, funkcias tie oficiala katedro de Esperanto.

Malpermesoj, traserĉoj, konfiskoj

La malpermesoj en Hispanujo povas ŝajni hodiaŭ, feliĉe, nura historiaĵo. Ne tiel feliĉa estas la stato en la najbara Portugalujo. Tie la persekutoj ricevis pli severajn formojn, kvankam, same kiel en Hispanujo, alternis permesoj kaj malpermesoj. La motivoj ŝajnas analogaj al tiuj en Hispanujo, nome iaj nebulaj ideoj, ke Esperanto estas en si mem politike tendenca. La unua, kaj plej peza bato, falis en 1948. Kiel notis "Scienca Revuo": "...laŭ dekreto de la Ministro de Internaj Aferoj de la 11-8-1948 ne estas permesataj iuj ajn aktivaĵoj aŭ presaĵoj esperantistaj, kaj laŭ la opinio de la Konsilantaro de la Eduka Agado, sankciita de la Subsekretario de la Ministerio de la Edukado, 21-10-1948, ne estas permesata la instruado de Esperanto en la lando..."

"Esperanto" en aprilo 1949 raportis: "La agentoj de la tiel nomita internacia polico lastatempe vizitis kaj traserĉis la loĝejon de la ĉefdelegito de UEA en Lisboa... samideanoj

en Madejro devis transdoni ĉiajn Esperantaĵojn, dokumentojn, leterojn, emblemojn k.s. al la polico." Kaj en la decembra n-ro: "La ŝtatpolico PIDE (polico por internaciaj aferoj kaj por ŝtatdefendo) traserĉis la hejmojn de la direktoroj de la Portugala Esperanto-Ligo kaj konfiskis, la 23-8-1949, ties arkivojn, bibliotekon kaj ceteran dokumentaron. La nomita Esperanto-organizo estas likvidita de la ŝtatpolico. Ĉiuj leteroj surhavantaj glumarkojn de Esperanto estos konfiskataj..."

Malgraŭ ĉio ĉi, en 1950 povis aperi artikoloj pri Esperanto en la portugala gazetaro, kaj la postan jaron venis la sensacia informo, ke la Prezidanto de Portugalujo nuligis la dekreton kontraŭ Esperanto. La ĉefdelegito de UEA povis skribi: "Vigle laboras nia PEA. Ĝiaj gvidantoj, elektitaj de Ĝenerala Kunveno leĝe funkcia, sin donas kore kaj anime al la fortikigo de la PEA-fundamentoj..." Ve, la entuziasmo estis tro frua, la permeso montriĝis same dubinda kiel la malpermeso, kaj la movado ekstagnis denove en stato de tima necerteco.

Ekblovas malvarma vento...

Pli oriente, en Francujo, sentiĝis ekblovo da stalinismo: "En Francio... la partiaj instancoj bojkotas nian agadon... la komunistaj gvidantoj tute ne deziras, ke la proletoj povu libere rilati kun alilandaj laborfratoj." Tiel juĝis, kun aldonitaj ekzemploj, membro de SAT en 1947. La sama vento blovis jam tra orienta Germanujo, kie la soveta milita registaro malpermesis la uzon de la lingvo ekde 1947. Ŝanceliĝa estis la sinteno de la usona milita registaro en sia zono de Germanujo. Laŭ "Esperanto" de marto 1948: "La Usona militista registaro en Bavarujo ĝis nun ne permesis eldoni Esperantajn librojn aŭ instruamaterialon, kaj malhelpas al la redaktoroj publikigi Esperanto-angulon en gazetoj. Tamen du ĵurnaloj... kaj du junularaj revuoj... regule publikigas Esperanto-kursojn k.s." Du monatojn poste "Esperanto" raportis, ke Radio München, stacio de la usona milita registaro, komencas elsendojn en Esperanto kaj dissendos Esperanto-kurson.

Samjare, en la soveta zono: "En Dresden okazis kunveno... la 11-an de aprilo. La prezidanto raportis pri klopodoj de la estraro por forigi la malpermeson, kiu daŭris unu jaron, rilate la uzon de Esperanto. La kunveno estis konkreta atesto pri la forigo de la malpermeso." Atesto trompa, tamen. Ankoraŭ dum la soveta regado venis neta malpermeso en formo de dekreto (de 12 jan 1949) de la Ministerio por Internaj Aferoj kaj aldona dekreto de 19 jul 1949. En la direktivoj por plenumo de la dekreto la artikoloj 6 kaj 7 ordonis malfondon de Esperanto-grupoj kaj tujan ĉesigon de Esperanto-rubrikoj en la gazetaro.

Kun tiu ĉi dekreto ni eniras la plej nigrajn jarojn de la stalinisma epoko, kiam Esperanto estos subpremata en preskaŭ tuta orienta Eŭropo.

(daŭrigota)


esperanto
februaro

(Antaŭ la portreto de Goya, farita
de lia disĉiplo Vicente López)

—Bonan tagon, don Francisko.
—Junulo, bonan tagon.
—Vi estas don Francisko Goya y Lucientes, kaj vin pentris via amiko kaj disĉiplo Vicente López. Bona pentraĵo, don Francisko. Via rigardo estas serena, via buŝo rekta, via vizaĝo sinjoreca. Tamen, vi ŝajnas tre serioza. Kial?
—Mi meditas rigardante la pasantojn, junulo. Ĉu vi vidis miajn pentraĵojn en la Muzeo?
—Kompreneble, sinjoro. Multfoje. Ĉu ni povas iomete babili?
—Plezure, junulo. Antaŭ mi troviĝas ĉiam la sama brua, sed senparola amaso da vizitantoj. Kion vi deziras scii, amiko?
—Don Francisko, mi petas, parolu pri via arto, vivo, luktoj, iluzioj...
—Mia vivo? Lasu al mi rememori...
—Vi naskiĝis en Fuendetodos, en la provinco Zaragozo...
—Jes. La 30 de marto 1746. Mia patro — mia kara patro — estis oraĵisto. Li multe kaj sukcese laboris. Li ŝparis sufiĉan monon por aĉeti domon. Kaj... ĉu vi scias, kion li faris el ĝi?
—Jes. Li vendis la domon por pagi viajn artajn studojn.
—Tia estis mia patro. Dekkvarjara mi estis, kiam li sendis min al la pentrejo de Luzan y Martinez en Zaragozo. Mi tie multe lernis dum ses jaroj.
—Tamen, laŭ onidiroj, vi tro rapide devis forlasi Zaragozon.

La Maja (maña) vestita

—Junulo, respektu miajn blankajn harojn. Bone... la vero estas, ke jes, okazis iu jupaferejo... ne grava, kompreneble, sed mi pensis oportuna rapidiri al Madrido. Mi estis tiam dudekjara.
—Kaj en Madrido vi laboris en la pentrejo de Francisko Bayeu.
—Jes. Bayeu estis vera artisto, kaj certe li influis sur mia tuta verko. Kaj ankaŭ en mia vivo. Multege mi lernis apud li. Sed mi volis pli. Ekzistis urbo en la mondo, kiu min altiris kiel magneto, al kiu mi sopiris, kiu estis la revo, la iluzio de mia vivo. Patrujo de grandaj artistoj, centro de la arta vivo en la mondo.
—Romo.
—Romo. Kaj tien mi vojaĝis.
—Oni diras, ke vi ne posedis monon kaj vojaĝis kun trupo de lastaklasaj aktoroj kaj taŭroludistoj. Kaj ankaŭ, ke eble vi aktoris kaj taŭroludis kun ili. Ĉu vere?
—Kiu povus tion rememori, knabo? Eble estas vere. Mi estis juna, mi vivis mian vivon.
—Don Francisko, parolu pri via vivo en Romo.
—Oh, ĝi estis por mi, kiel artisto, senĉesa plezuro. La tuta panoramo de la pentrarto etendiĝis antaŭ miaj okuloj. Mi sorbis la lekciojn de la plej famaj pentristoj. Da Vinci, Tintoretto, Tiziano... Mi ebriiĝis antaŭ iliaj verkoj.
—Kaj vi pentris sur la stratoj.
—Jes. Min altiris la interesaj tipoj ĉie ape-



rantaj. Kaj en la anguloj de la romaj stratoj, en la sunaj placoj aŭ en humilaj anguletoj, ĉe l' bordo de l' rivero aŭ sur la romaj montetoj, mi pentris maljunulojn, infanojn, ridantajn knabinojn... Ah, mi ĝuas tion memorante. En Parma mi gajnis duan premion en arta konkurso. La unuan gajnis Paŭlo Barroni.

—Kiu estas Paŭlo Barroni, don Francisko?

—En 1771 mi revenis al Hispanujo. Kaj unue... al Zaragozo. Por brakumi miajn gepatrojn. Mi alportis diversajn verkojn kaj, super ĉio, la prestiĝon veni de Romo. En Zaragozo mi pentris multe, multe, senĉese.

La enamiĝo

—Kaj vi ankoraŭ pli funde amikiĝis al la familio de via majstro Francisko Bayeu kaj lia frato Ramon. Kaj, al la fratino Josefina Bayeu.

—Jes. Josefina kaj mi enamiĝis. Mi estis jam dudeknaŭjara, kiam ni edziĝis. Elkore ni amis nin, junulo. Dudek gefiloj naskiĝis el nia amo, sed nur unu, Javier, postvivis. Estis aliaj tempoj... Ni instaligis en Madrido.

—Vi finfine havis propran familion. Multe vi laboradis.

—Senĉese, junulo. Kaj tre frukte, el artista kaj mona vidpunktoj. Nur en tri jaroj mi gajnis 140 000 realojn. Mi tiam komencis fari desegnojn por la Reĝa Tapiŝ-Fabriko. Por tion atingi, multe helpis mia bofrato Francisko, kaj ankaŭ la fama pentristo Mengs, kiu vere estis la mastro en la reĝa palaco, pri artaj aferoj.

—Poste vi kverelis kun via bofrato.

—Pri tio mi hontas, knabo. Ĝi okazis en Zaragozo. Kaj poste, en Madrido, oni mendis al mi pentri la kapelon de Sankta Francisko la Granda, kie mia bofrato estis pentranta la

ĉefan altaron. Tiutempe ni absolute ne interrilatis. Kontraŭe, ni laboris kiel malamikoj. Jes, mi hontas... En 1784 oni montris al la publiko nian verkon.

—Jes, don Francisko. Kaj via genio mallumigis la talenton de via bofrato. Kaj sinjoro la Ministro Floridablanka mendis al vi sian portreton. Kaj la Akademio de Sankta Fernando vin nomis vicedirektoro. Kaj vi havis postenon altege pagitan en la Reĝa Fabriko de Tapiŝoj...

—Tio postulas komenton, knabo. Estis multaj kaj bonaj la aspirantoj al tiu lasta nomiĝo. Oni mobilizis la influajn amikojn, oni petis rekomendojn, ĉar jam en tiu tempo Hispanujo estis la lando de la rekomendoj, kara junuleto. Mia bofrato Francisko Bayeu deziregis la postenon por sia frato Ramon.

—Sed lia arta honesteco estis multe super viaj personaj diferencoj kaj li energie rekomendis vin.

—Tiel estis. Oni asignis al mi la postenon. Pro iu maldiskreteco mi sciis pri lia kaŝa helpo. Mi kuris, kuregis al lia hejmo, por sincere lin danki kaj por denove refratiĝi al li.

—Jes, kaj via amikeco daŭris por ĉiam, tio estas vero. Kaj poste...?

Reĝa pentristo

—Poste? Poste, ĉio. Samjare la reĝo Karlo la Tria nomas min reĝa pentristo. Malfeliĉe, mi devis tiam ŝanĝi mian simplan kaj trankvilan vivmanieron. Mi ampleksigis mian domon, ĝin meblis lukse kaj aĉetis veturilon. Mi ja ne povis iri al la reĝa palaco en luita fiakro, ĉu?

—Kompreneble, don Francisko. Viaj gustoj ĉiam estis simplaj, kaj vi ne devas senkulpiĝi pri via triumfo. La fakto estas, ke alvenis la

La Maja nuda



tempo de via arta matureco, de via meritita gloro.

—Mi ne aŭdas bone, knabo. Malfeliĉe, mi iom estis surdiĝinta. Kaj tiam mortis la reĝo. Ascendis al la trono Karlo la Kvara...

—... kiu ankaŭ favoris vin, samkiel ĉiuj liaj ministroj.

—Certe. Mi faris portretojn al la membroj de la reĝa familio kaj al multaj korteganoj. Kaj mi pentris ilin sincere, ĝuste kiel ili estis, belaj aŭ malbelaj.

—Ja. Via peniko flatis nek princojn nek monarkojn. Tion ni povas observi en la apudaj salonoj de la Muzeo, don Francisko. Reĝoj kaj nobeloj sidis aŭ staris antaŭ viaj tolaĵoj, kaj nun ni povas ilin kontempli senpasie. Vi ne faris distingojn inter vilaĝano kaj reĝo. Reĝan malbelecon — eĉ reĝinan — vi ne mildigis. Viaj pentraĵoj montras krude la verajn trajtojn, inteligentajn aŭ stultajn, princajn aŭ kamparanajn. Vi pentradis rekte, sincere, ne flate.

—Mi estas aragona, knabo.

—En 1792 via sano komencis malfortiĝi, kaj vi surdis pli kaj pli. Ĉu tiam vi iniciatis viajn rilatojn kun dukino de Alba?

—Mi surdiĝis pli kaj pli, jes.

—Kaj vi pentris tiujn du juvelojn, kies nomoj estas nun "Maja nuda" kaj "Maja vestita". Don Francisko, mi petas, respondu al mi man-surbruste: Kiu estis via modelo por tiuj pentraĵoj? Estis eble...?

—Ĉiutage pli kaj pli surda mi fariĝis, malfeliĉe.

—Ja, ja, sinjoro. Via famo kreskis, vi pentris la kapelon de Sankta Antonio de la Florida, en Madrido, apud la rivero Manzanares, kio tute sola sufiĉus por glorigi nomon de artisto. En

1799 Karlo la Kvara nomis vin unua reĝa pentristo kun altega salajro.

—Sed poste venis milito, karulo. La napoleonaj trupoj invadis mian landon. Vi rerigardu mian pentraĵon "La fusilmortigoj en la Moncloa". Mi pentris tiujn kvazaŭ rompitaĵn, pupecajn figurojn kun larmoplenaj okuloj. La fiago okazis tre proksime al nia Muzeo en 1808.

—Milito kaj krimo estas parencaj vortoj, don Francisko. Finfine, la milito finiĝis, kaj ni surtronigis novan reĝon, Fernandon la Sepan, kiun ni hispanoj nomis "La Dezirata". Ĉu bona?

—Jam tute surda mi estis tiam, fileto. Kaj malsana. Pro tio mi vojaĝis al Parizo kaj al Bordeaux. Je mia reveno al Madrido, Vicente López min pentris ĉi tie.

Fantomoj kaj monstroj

—Kaj poste, denove al Bordeaux, kara don Francisko. Tie vi pentradis halucinajn scenojn, fantomojn, monstrajn estaĵojn, antaŭ kiuj ni staros silente en la apudaj salonoj. Ĉi tiu Muzeo, kaj multaj aliaj en la mondo, majstro admirata, posedas viajn verkojn, kaj apud la strekoj de via peniko, flugas via spirito silente, kvazaŭ gardante la amatajn kolorojn, kaj mi firme kredas, ke vi poreterne rigardas kun serenaj okuloj la oran, dolĉan, mirindan karnon de via mistera kaj nekonata "Maja", tiu virino, kiun vi eble adoris dumvive kaj dum-morte riverencas.

—Mi ne aŭdas vin. Mi surdas, junulo. Ne plu parolu. Kaj nun... iru rigardi miajn verkojn. Ili estas mi.

JES

Intervjuis: J. Juanes

La pafmortigoj de la 3-a de majo 1808 (fragmento)



INTERVJUO KUN LA REDAKTORO DE BIBLIA REVUO

D-ro Broadribb, kio estas Biblia Revuo?

Granda risko, por la eldonantoj. Pli serioze: ĝi estas, miakrede, unika entrepreno eldoni profesinivelan revuon pri ĉio rilatanta al bibliaj studoj — tio estas: historio, sociologio, mitologio, arkeologio, kaj la multaj aliaj -ioj tiuspecaj.

Ĉu ĝi estas, do, religia gazeto?

Efektive ne. La Biblio estas, unuavice, la antikva literatura restaĵo de palestinaj popoloj de antaŭ 3000 ĝis 2000 jaroj. Oni povas legi kaj studi la poemojn de Homero ne estante ano de greka religio; kaj oni povas studi la bibliajn tekstojn sen religia tendenco. **Biblia Revuo** ne estas kontraŭreligia, sed ĝi ne propagandas iun religion aŭ sekton. Inter la abonantoj estas sacerdotoj kaj pastroj kristanaj, judoj, kaj senreligiuloj. Miaopinio, budhistoj, islamanoj, kaj aliaj ankaŭ pli bone lernus koni la "okcidentan" kulturon, se ili legus la revuon.

Do ĝi ne estas nur por "profesiaj" bibliistoj?

Mi diris, ke ĝi estas "profesi-nivela", tio estas, ke ni postulas precizecon, fideindecon, intelektan karakteron egalajn al tiuj uzataj profesie. Pro tio, profesiulo povas uzi la revuon, lerni per ĝi, kaj kontribui al ĝi. Sed ĉiu klera interesato povas (mi esperas) kompreni kaj uzi la enhavon de la artikoloj. Mi klopodas, ke ĉiu numero enhavu materialon kun ĝenerala intereso. Ekzemple, en numero 5, longa artikolo temis pri "Edukado en la Antikva Proksima Oriento," alia artikolo temis pri "Martin Buber, Edukisto," dum aliaj artikoloj havis pli mallargan karakteron, ekz. "Provo de Transskribo de Du Ŝemidaj Lingvoj (Hebrea kaj Araba) kaj de la Greka Lingvo."

Kion vi celis, per la revuo?

Supozeble vi volas demandi, "kian celon ni havis, kiam ni fondis ĝin." Ni havis du celojn. Unue, ni konvinkigis, ke Esperanto neniam povos penetri la fakan mondon, se ĝi daŭre uziĝos nur por priesperantaj aferoj, aŭ por populara literaturo. Ni opiniis, ke se aperados profesikvalitaj verkoj en Esperanto, profesie interesataj personoj volos legi ilin. Due, nin ĉagrenis la ĥaosa situacio en la profesiaj gazetoj, kie unusama numero ofte enhavas artikolojn en lingvoj angla, germana, franca, rusa, aĉ itala, latina, hispana, kc. Se eblos publikigi revuon tute en Esperanto, kun prifierinda nivelo, tio mem povos esti helpo.

Sed kiel tiuj "profesie interesataj personoj" povos legi ĝin?

Esperantistoj ofte forgesas, ke, origine, Zamenhof proponis sian lingvon kiel "naturalistan projekton." Mi regule spertas, ke bone instruita persono, kiu jam kutimas barakti pri artikoloj en tiel diversaj lingvoj, tute facile kaj senerare komprenas Esperanton tute sen

studo. Pluraj el niaj kontribuantoj neniam legis Esperanton, antaŭ ol unue vidi nian revuon. Nun ili donas al ni artikolojn.

Se mi bone komprenas, vi volas neesperantistajn legantojn. Kiel vi atingas tion? Ĉu vi sukcesas?

Inter idealo kaj realo estas granda distanco. Ni volas ĉiajn legantojn, esperantistajn kaj neesperantistajn. Dum la unuaj jaroj, precipe, ni devos dependi de esperantistaj abonoj, ĉar nur malrapide la publiko interesiĝas. Pro la alta kvalito de Biblia Revuo, ĝia enhavo nun estas regule indeksata en pluraj literaturindeksoj profesiaj. Per tio la publiko komencas koni la nomon kaj interesiĝi pri ĝi. Sed neesperantistoj plejofte abonas, nur kiam iu esperantisto jam montris ekzempleron de la revuo al ili.

Do vi ja sukcesas?

Kiel dirite, estas granda distanco inter idealo kaj realo. Tamen, ni spertis kelkan sukceson. Biblia Revuo aperis en 1965 kaj 1966, sed devis paŭzi dum 1967. Nun, la Itala Biblia Asocio akceptis eldoni la revuon, kaj ĝi denove regule aperas, komencante en januaro, 1968.

Biblia Revuo estas eksterordinara, kompare kun la aliaj gazetoj en Esperanto.

Jes. Ni opiniis, pro spertoj pri aliaj gazetoj, ke, kiam gazeto komenciĝas kiel populara, kun malgranda amplekso, ĝi poreterne restas tia. Ni komencis eldoni Biblian Revuon kvaronjare, kun 80-paĝaj kajeroj. Tio donas al ĝi amplekson sufiĉan por aperigi variajn artikolojn, kaj por vekti atenton. Nun la revuo estas dumonata. La abonprezo estas relative alta: 6 usonaj dolaroj. Sed por tiu sumo oni ricevas multan enhavon.


Kiu verkas por Biblia Revuo?

Tre diversaj personoj. Mi mem kontribuis artikolojn pri Carl Jung kaj la Biblio, pri la Epistolo al la Hebreoj, pri hebrea poezio, kc. Kolego A. Capell, en Aŭstralio, verkis pri instruado de ŝemidaj lingvoj, kaj pri lingvo kaj religio. Stefan Maul, Germanujo, verkis pri Johano Baptisto. George Rust, Anglujo, donis al ni verkon pri tekstkritiko kaj verkojn pri aliaj temoj. Sed ni ankaŭ aperigas originalajn artikolojn de neesperantistoj, Helmer Ringgren, John Bowman, J. Mánek, kaj aliaj personoj. Nur en Esperanto, kompreneble.

Se iu el niaj legantoj volas aboni Biblian Revuon, al kiu li skribu?

Ni establis reton da agentoj en diversaj landoj, kiun doni ĉi tie ne estus eble. Sed interesato povus skribi al la administracio de Biblia Revuo: D-ro Mario Lapucci, via Baccarini 80, RAVENNA, Italujo. La abono kostas 3.000 italajn lirojn, aŭ ses usonajn dolarojn.

Certe interesa kaj laŭdinda entrepreno. Dankon.



Donald Broadribb

espera
februaro 1



Revenante de la interlingvistika ekskurso al la hejmaj regionoj, ni turnu nian rigardon nun al la originala literaturo beletra de E-o. Fine du lastaj ĉapitroj tujsekvaj okupiĝos pri periodaĵoj kaj eldonejoj, du faktoroj intime interplektitaj kun la literaturo. Ankaŭ rilate la literaturon nia ĉefa celo estas montri al la leganto la helpilojn, per kiuj studi ĝin kun pli da kompreno. Unu averto tuj necesas. Se la E-an historion oni povas (eble) studi nur per priskribaj verkoj, literaturon oni ĉiam devas studi per la primaraj verkoj. Ĉio alia devas resti nur aldona, sed ne anstataŭa.

Nu, estas hodiaŭ malfacile atingi malnovajn literaturaĵojn. Tial ni ĉefronte nomu du ĉefajn kolektojn, kies kono estas minimuma por ĉiu:

William Auld (red.): *Esperanta Antologio*, La Laguna 1958. Ĝi donas la plej bonan superrigardon pri nia originala poezio, kaj pro la valora enkonduka studo ĝi estas samtempe ia resuma literaturhistorio. La elekto mem en kelkaj punktoj estas eble iom persona, sed tio ne povas depreni iom de la valoro de la verko.

La prozan antipodon de la libro prezentas:

Reto Rossetti/Ferenc Szilágyi (red.): 33 rakontoj. *La Esperanta novelarto*, La Laguna 1964.

Ci tie la devigo al elekto estis eĉ pli drasta, kaj sendube oni povus kompili plian volumon kun same valora materialo. Sed jam en sia nuna formo la kolekto plenumas sian ĉefan celon, t.e. inklinigi al legado.

Dum tiuj verkoj konatigas nin kun la fontoj mem, ni bedaŭrinde ĝis hodiaŭ ne posedas detalan literaturhistorion. Pro tio ni nomos tie ĉi kelkajn provojn sur tiu kampo kaj faros — iom kontraŭ nia ĝisnuna principo — mencion de kelkaj gravaj artikoloj. Fine, oni ne forgesu, ke ankaŭ al recenzoj (se ili respondas al la postulataj kriterioj) atribuiĝas literaturkritika valoro.

Malaktualiĝis, sed restas (ĉar unika ĝis hodiaŭ) konsultinda la verko de:

Ludoviko Totsche: *De paĝo al paĝo*, Budapest 1932.

La aŭtoro (la hodiaŭa Lajos Tárkony) kalejdoskope prezentas la ĝistiamajn literaturajn produktojn de Baghy, Bodó, Dresen, Engholm, Forge, Hohlov, Kalocsay, Robinson, Schwartz, Sturmer kaj Szilágyi.

Certan valoron por nia temo havas ankaŭ:

G. J. Degenkamp: *Esperanto 60-jara*, Amsterdam 1947.

Tamen oni ne povas akcepti ĉiujn vidpunktojn de la aŭtoro. La libro, cetere, pli klopodas reliefigi la lingvan ol la literaturan evoluon de E-o.

De limigita valoro estas plie:

G. P. de Bruin: *De Esperanto-literatuur in vogelvlucht*, Amsterdam 1946.

Pli atentinda, kvankam ankaŭ nur de registra karaktero, estas:

Vlastimil Novobilský: *Skizo pri la Esperanta literaturo*, Opava 1956. — La verko estas jam elĉerpita.

Kun pli granda profito oni legos hodiaŭ:

Drago Kralj: *Kvar prelegoj pri Esperanta literaturo*, Ljubljana 1960.

La libro sendube superas ĉiujn similajn provojn, tamen ĝi ne havas literatursciencan valoron, kaj tial estas kurioze ĝin meti sur la legoliston de la Internacia Ekzameno. La aŭtoro mem konfesas la nedisponon de elĉerpitaj literaturaĵoj. Nu, bona volo sola estas tamen tro malmulte da investo por scienca tasko.

Fine estu menciita unu anglalingva traktaĵo:

K.R.C. Sturmer: *Esperanto Literature. Notes and Impressions*, London 1930.

Valoraj unuopaj studoj


Multe pli valoraj ol tiuj verkoj estas unuopaj studoj, el kiuj kelkaj gravaj estu notitaj:

Pri niaj du plej gravaj verkistoj, Kalocsay kaj Baghy, oni ĉiam profite konsultos la memorlibron:

Arĝenta Duopo, Budapest 1936,

(daŭrigo dekstre)

*Iama literatura
kunveno en Łódź:
de maldekstre
Stanisław Braun
(Wiktor Elski);
Stanisław Karolczyk
(Eska);
Antoni Grabowski;
A. Hiuz;
Włodzimierz Pfeiffer*



Informado al sciencaj medioj en Würzburg

"Esperanto in der Universität". Tiel, okaze de la 11-a IS de GEJ fine de 1967, plurfoje raportis la gazetoj en Würzburg, nordbavara universitata urbo. La ĉeesto de elstaraj esperantanoj dum la GEJ-seminario ebligis al studentoj laborantaj por la Internacia Lingvo atentigi la universitatajn mediojn pri la valoro de Esperanto, per du publikaj aranĝoj sub aŭspicio de "Internationaler Studienkreis", ne-esperantista klubo de internaciemaj studentoj.

Prelego en Esperanto, resumo germane

Prof. Lapenna faris fakan sciencon prelegon pri "La Nuntempa Soveta Koncepto pri Ŝtato kaj Juro". Elokventa esperantlingva prezento de la enhavo ne plu permesis dubojn pri la taŭgeco de Esperanto por scienca uzo. Por ne-(jam)regantoj de la lingvo oni disponigis germanlingvan resumon de la prelego, kiu — laŭ vortoj de Michael Zeilinger, estro de "Studienkreis", en la enkonduko — estis la unua esperantlingva fakprelego en tiu universitato.

Post paŭzeto sekvis podia diskutado pri "Esperanto en la universitatoj?", en kiu — sub gvidado de M. Zeilinger — partoprenis lingvisto Prof. Berchem, fizikisto Prof. Scheer (ambaŭ univ. Würzburg), Prof. Lapenna, John C. Wells kaj D-ro Sadler. La diskutado estis altnivela,

objektiva kaj detala. Malgraŭ la temo ĝi ĉefe okupiĝis pri la karaktero kaj funkcio de Esperanto, pri kiu ĝi certe forigis multajn antaŭjuĝojn. Specialan signifon donis la ĉeesto de la universitata rektoro, Prof. Fleckenstein, kiu poste donis afablan akcepton-regalon por la diskutintoj kaj seminarianoj.

Ampleksa, zorgema kaj detala preparo far' de la lokaj organizintoj certigis efikon kaj altnivelecon de ambaŭ aranĝoj. Prof. Lapenna mem verkis sian preleg-resumon, kiun oni tradukis tre ekzakte uzante la respektivajn germanajn fakterminojn. 660 invitiloj — zorge redaktitaj kaj digne multobligitaj sur bona papero — estis dissenditaj al universitatanoj. Kontaktoj kun 25 profesoroj (invite al la diskut-partopreno) informis pri granda interesiĝo de multaj docentoj. La germanaj diskutantoj sufiĉe frue ricevis informmaterialon pri la lingvo. Detala diskut-punktaro (la esperantanaj diskutantoj antaŭe detale preparolis ĝin) certigis, ke la interparolado flue progresis kaj tuŝis la esencajn punktojn. Entute la aranĝo, kun karaktero sobra, scienca kaj objektiva, metis bonan bazon por plua laborado en la universitata medio. La esperantanaj studentoj de Würzburg per dignaj kaj prudentaj paŝoj daŭrigos klopodojn por en-universitatigo de Esperanto.

AKIS

Enkonduko en la libroskiencon

(daŭrigo de maldekstre)

kies unua volumo enhavas aron da interesaj kaj legindaj artikoloj pri ambaŭ poetoj. ⁽¹⁾

Kalocsay mem verkis plurajn valorajn studojn pri hodiaŭ forgesitaj literaturaj figuroj el la komenca periodo de nia lingvo: Bicknell, Hankel, Braun, Kozlowsky, van Scher Belmont ⁽²⁾.

Por ne tro eniri la detalojn ni limiĝos al jenaj rimarkindaj studoj. La romanojn de Bulthuis plej bone analizis N.V. Nekrasov ⁽³⁾, al kiu ni ankaŭ dankas studojn pri Hohlov ⁽⁴⁾ kaj Jung ⁽⁵⁾. William Auld okupiĝis pri Miĥalski (unu el liaj favoratoj) kaj Varankin ⁽⁶⁾.

La malfacila tasko alfronti la verkadon de detala literaturhistorio restas do solvota, kaj ĝia dezirindeco kreskos kun la kontinua ampleksiĝo de nia literaturo.

⁽¹⁾ Pri Kalocsay estas rekomendinde legi la jenajn artikolojn:

H. Vatré: K. Kalocsay kaj ni, en: NLR 6 (1960) 221-22.

K. Matuba: Kalocsay en traduko de orientaj

poezioj, en: NLR 6 (1960) 225-36. (Represita en Japana Kvodlibeto, La Laguna 1965.)

H. Tonkin: Kelkaj pensoj pri Kalocsay, en: NLR 7 (1961) 58-63.

R. Hauptenthal: Senlaca titano de nia parnaso, en: GER 19 (1966) 97-98, 106.

⁽²⁾ Clarence Bicknell, en: NP 12 (1966) 168-71. Variantoj pri la temaro de Marie Hankel, en: NP 4 (1958) 213-17.

Stanislaw Braun, la droninta poeto; en: NP 5 (1959) 76-78.

(pri la sama: William Auld: Pluaj agordoj, en: NP 5 (1959) 179-81.)

Revivigo de Czeslaw Kozlowsky, en: NP 5 (1959) 120-25.

Jan van Schoor, en: NP 5 (1959) 211-14.

Leo Belmont, la gaja poeto, en: NP 6 (1960) 110-12, 160-63.


⁽³⁾ La nigraj kaj blankaj manoj. Kritika skizo pri la romanoj de H. J. Bulthuis, en: La Nova Epoko 7 (1929) 12-16; 8 (1930) 133-35.

⁽⁴⁾ Artistoj de verso. Kritika skizo pri N. Hohlov kaj E. Miĥalski, en: La Nova Epoko 7 (1929) 316-20.

⁽⁵⁾ Limoj de l' fantazio: Kritika skizo pri nova originala romano de Teo Jung, en: La Nova Epoko 7 (1929) 123-28, 188-89, 253-55.

⁽⁶⁾ Pasio-Pasivo, en: NLR 1 (1955/56) 20-26.

Forgesita ĉefverko, en: NLR 7 (1961) 221-25 (pri "Metropoliteno").



.: s-ro J. Toczyski

GRAVA DECIDO DE LA POLA MINISTERIO DE KLERIGO KAJ SUPERAJ LERNEJOJ

Kun granda ĝojo kaj interesiĝo ni sciigis pri la sukcesoj ĉe la pola Ministerio de Klerigo kaj Superaĵoj, atingitaj je la fino de la pasinta jaro. En niaj manoj troviĝas du dokumentoj: 1) La letero de la dirita Ministerio al la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio de 28 novembro 1967, kaj 2) la cirkulero de la sama Ministerio, kun la sama dato, direktita al ĉiuj distriktaj lerneĵaj kuratorejoj kaj al la departementoj de ĝeneraledukaj lerneĵoj, de profesiaj lerneĵoj, kaj de eksterlerneĵa edukado en la sama Ministerio. Pro la graveco de ambaŭ dokumentoj ni citas ilin laŭvorte en Esperanta traduko kun la originala signaro:

Pola Demokratia Respubliko
Ministerio de Klerigo kaj Superaĵoj
Al. I. Armii W.P. 25

Warszawa 28/XI 1967

Pola Esperanto-Asocio — Ĉefa Estraro —
Warszawa — str. Jasna 6.
Nr. PRL-4120/Esp.-2/67.

Responde je via letero de la 17-a de januaro 1967 Nr. 296/67, la Ministerio sendas la programon pri instruado de la lingvo Esperanto, aprobita por la tri unuaj jaroj de instruado. Konforme al la skriba decido de la Ministerio de la 23-a de novembro 1965 la instruadon de Esperanto por ĝelernantoj de la popollerneĵoj kaj mezlerneĵoj oni povas organizi en la kadroj de la okupoj eksterlerneĵaj aŭ de okupoj lerneĵaj ekster la normala horaro.

La programo prezentas la bazon por la prilaboro unue de rimarkoj pri ĝia realigado kaj poste de la necesaj lernolibroj. Konforme al la konkludoj de la interparoloj kun la Ĉefa Estraro de PEA la Ministerio atendas baldaŭ la prezenton de la projekto pri la "rimarkoj koncerne al realigado de la programo" por ĝin aprobi. La Ministerio povus komisi la eldonon de lernolibro por enlerneĵa uzo al la Ŝtata Entrepeno de Lerneĵaj Eldonaĵoj (Państwowe Zakłady Wydawnictw Szkolnych), sed nur post la fino de la laboroj ligitaj kun la "rimarkoj koncerne al realigado de la programo". Se PEA mem entreprenus la laborojn ligitajn kun la verkado de lernolibroj kaj aliaj helplibroj (gramatiko, lerneĵa vortaro, interparoloj ktp), ilia aprobo (flanke de la Ministerio, rim. red.) estus necesa antaŭkondiĉo por ilia enkonduko por uzo en la lerneĵoj kaj la institucioj de eksterlerneĵa edukado. Laŭ la ĝisnunaj principoj, la provizadon de lerneĵoj kaj aliaj institucioj, kie oni instruas Esperanton, per la deviga programa dokumentaro kaj lernolibroj organizas PEA en la propra aranĝo.

La Lerneĵaj Kuratorejoj estas informitaj pri la principoj de Esperanto-instruado kaj pri la supre menciitaj kondiĉoj de provizado de lerneĵoj per la programoj kaj lernolibroj. Sciigo pri ĉi tiu afero aperos ankaŭ en la Ofica Ĵurnalo de la Ministerio. Ni aldonas la programon kaj kopion de la cirkulero sendita al la Kuratorejoj.

Direktoro de Departemento:*

D-ro M. Maciaszek

* Departemento de Programoj.

Ministerio de Klerigo kaj Superaĵoj
Nr. PRL-4120-Esp-2/67

Warszawa 28/XI 1967

En ligo kun la disvolvo de Esperanto-instruado gvidata de PEA, estas prilaborita kaj aprobita de la Ministerio instru-programo por la tri unuaj jaroj de instruado de tiu lingvo. La instruado de Esperanto povas esti aranĝata en grupoj de ĝelernantoj, kiel okupo ekster la normala horaro en popol- kaj mez-lerneĵoj, aŭ en la institucioj de eksterlerneĵa edukado (en junularaj kulturdomoj) laŭ la principoj fiksitaj en la dekreto de la Ministerio de Klerigo de 12.VII.1952 rilate al instrukcio pri okupoj ekster la normala horaro (Ofica Ĵurnalo de M. de Kl. N-ro 12 poz. 95) kaj laŭ la organizaj principoj pri la laboroj de lerneĵaj rondetoj, publikigitaj en la jaro 1950 (Of. Ĵur. de Min. de Kl. N-ro 9, poz. 254).

La provizadon de lerneĵoj kaj aliaj institucioj de Esperanto-instruado per la deviga programa dokumentaro kaj lernolibroj organizas PEA en propra aranĝo. Aldone: la programo.

Direktoro de Departemento:

D-ro M. Maciaszek

Kvankam en Pollando ekzistis jam la ministeria dokumento pri permeso de Esperanto-instruado en la lerneĵoj, tamen la nova ministeria cirkulero starigas la aferon sur tute nova nivelo kaj donas grandajn avantaĝojn al PEA. La direktoroj de lerneĵoj en Pollando certegrade havas la rajton enkonduki iun objekton de instruado laŭ propra bontrovo, se la financaj kondiĉoj permesas tion, kaj tial en kelkaj lerneĵoj en Pollando oni instruas Esperanton eĉ kiel devigan objekton (en Krakovo, Zielona Góra, Sosnowiec, Gdańsk, Wrocław kaj Sopot), sed ĝenerale la direktoroj defendis sin kontraŭ la proponoj pri enkonduko de Esperanto, farataj de Esperanto-instruistoj. La supre citita cirkulero, preskaŭ dekreto, kies teksto aperos ankaŭ en la Ofica Ĵurnalo de la Ministerio, havas vere grandan signifon kaj malfermas la vojon teorie al ĉiuj lerneĵoj en Pollando. Ĝi

ankaŭ donas al la Esperanto-instruistaro gravan armilon en la manojn. Ĉiuj gazetoj en Pollando ripetis en komunikoj la sciigon pri la aprobo de la programo fare de la Ministerio, kio ankaŭ bonege influis la favoran atmosferon por Esperanto en la lernejoj. Ĝi estas ja oficiala agnosko de Esperanto kiel studobjekto preskaŭ egalrajta kun la aliaj objektoj nedevige instruataj en la lernejoj, sed instruindaj. Ege grava estas ankaŭ la fakto, ke la Ministerio oficiale promesas eldoni en la estonteco pere de la Ŝtata Entrepeno de Lernejoj Eldonaĵoj lernolibrojn verkitajn laŭ la aprobita programo, kio plialtigas la rangon de Esperanto-instruado kiel lerneja studobjekto kaj oficialigas ĝin.

Programoj ĝis nun mankis

La vojo elektita de PEA ŝajnas esti la plej celtrafa en niaj penadoj oficialigi Esperanto-instruadon en la lernejoj. Kiam instruisto venas al la lernejo por instrui, lia unua dokumento por realigi la instruadon estas la programo. Kaj vere, se temas pri Esperanto-instruado, tio ĝis nun mankis kaj mankas eĉ ankoraŭ, se ne en ĉiuj, do certe en multaj landoj. Pri la aprobo de la programo oficiale sciigas la lernejoj aŭtoritatoj rekte de la Ministerio, kaj tio ankaŭ estas certagrade ia plua oficialigo, nome oficiala agnosko de Esperanto-instruado flanke de la Ministerio.

La atingojn oni ŝuldas al la Instruista Sekcio de PEA, kaj precipe al ĝia vic-prezidanto s-ro Andreo Pettyn, konata aŭtoro de lernolibroj verkitaj laŭ la struktura metodo, kiu estas ankaŭ la aŭtoro de la aprobita programo.

Ŝajnas al ni, ke la ekzemplo de Pollando devas esti ia instigilo por la agado de personoj, kiuj respondecas pri la oficialigo de Esperanto-instruado en aliaj landoj. Gratulante al la poloj, ni atendas similajn sciigojn el aliaj landoj.

LINGVAJ MALFACILAĴOJ EN LERNEJA KORESPONDADO

En 1965 kaj 1966 la Internacia Federacio de Organizaĵoj por Lernejoj Korespondado kaj Interŝanĝoj (FIOCES) aranĝis eksperimentajn interŝanĝojn inter ĉ. 30 mezgradaj lernejoj en 10 landoj de Azio, Eŭropo kaj Usono. La eksperimentoj okazis laŭ kontrakto kun Unesko kaj kun subvencio de kvar mil dolaroj, kaj ili havis la celon kontribui al la celoj de la Projekto Oriento-Okcidento.

La lingvo elektita por la korespondado kaj interŝanĝoj estis la angla.

Nenia solvo proponita

En novembro 1967 aperis la (franclingva) raporto de FIOCES pri la eksperimento, en kiu oni konklude listigas 8 diversajn malhelpojn renkontitajn. La kvina malhelpo estis: "lingvaj malfacilaĵoj, precipe gravaj ĉe la aziaj lernejoj". Sur la sekvanta paĝo la

raporto listigas 6 proponitajn solvojn por tiuj malhelpoj. Por la lingvaj malfacilaĵoj, tamen, ĝi proponas nenan solvon.

"La proksimuma angla lingvo"

Signifaj estas ankaŭ la komentoj raportitaj el unuopaj landoj. Franca lernejo raportis pri siaj kontaktoj kun japana gimnazio: "Ĉar la interŝanĝoj okazis en lingvo fremda por ambaŭ lernejoj, estis preferinde kiel eble plej malgrandigi la skriban parton kaj anstataŭigi ĝin per bildoj, fotoj, mapoj ktp., kun iom simpla komentario. Tio ŝajne plaĉis al niaj korespondantoj, ĉar ili sekvis nian ekzemplon." Oni atentigas, ke la neceso trovi klasojn kapablajn korekte skribi la anglan rezultigis, ke la aziaj klasoj elektitaj estis ĝenerale pli aĝaj, ol la okcidentaj, kio siavice ĝenis la interamikiĝon. El Tajlando oni raportis, ke "la tempo bezonata por korektado de la leteroj skribitaj en ia proksimuma angla lingvo multe ĝenis la disvolviĝon de la interŝanĝoj". La francaj instruistoj opiniis: "La profitoj por la lernantoj estus pli grandaj, se ili scipovus la koncernan azian lingvon. La angla estis efektive nura helplingvo por ambaŭ flankoj." El Cejlono oni raportis malfacilaĵojn pro la fakto, ke la angla ne plu estas la instrulingvo en cejlonaj lernejoj. El Japanujo: "La lingvaj malfacilaĵoj forte bremsis la disvolviĝon de la interŝanĝoj. Oni ne devas forgesi la tre grandajn malfacilaĵojn, kiujn renkontas japana lernanto, kiu provas skribi en la angla aŭ la franca."

Kelkaj lernejoj elektitaj entute ne reagis al leteroj el aliaj landoj. Pri la kaŭzo oni povas nur konjekti.

ANKORAŬ PRI ASOCIĜINTAJ LERNEJOJ

Ni ofte substrekas la gravecon de kunlaboro kun la Asociĝintaj Lernejoj de Unesko, kies organizo estas tiel parenca al la principoj de nia movado. Kun plezuro ni notas, do, ke, laŭ sciigo el la lasta numero de la Bulteno de la Kanada Nacia Komisiono por Unesko tute dediĉita al la problemoj de tiuj lernejoj, la agado de Asociĝintaj Lernejoj de Unesko en tiu lando disvolviĝas bonege. Al la programo pri edukado en spirito de internacia komprenemo aliĝis 30 lernejoj.

En Danlando, en Lyngby apud Kopenhago, estis organizita je la 25-a kaj 26-a de oktobro de la pasinta jaro internacia konferenco je la temo "lerneja leg-materialo por la lernantoj, plifortiganta la celojn de edukado en spirito de internacia komprenemo". Ankaŭ en Danlando la agado de la Asociĝintaj Lernejoj de Unesko bone disvolviĝas.

Ni atentigas pri tio niajn gekolegojn de tiuj du landoj kaj proponas al ili ligi kontaktojn kun tiuj lernejoj kaj esplori la eblecojn pri kunlaboro kaj eventuala enkonduko de Esperanto.

(turnu)

LERNEJA KOMISIONO EKFUNKCII EN FRANCUJO

Laŭ informoj ricevitaĵ el Francujo, la nova Estraro de la franca asocio Unuiĝo Franca por Esperanto restarigis lernejan komisionon, kiu klopodos speciale prizorgi la agadon en lernejoj kun la celo enkonduki Esperanton. La nova Komisiono konsistas el jenaj personoj:

Prezidanto: S-ro F. Boyet, direktoro de seminario por instruistoj en Angers, 3 rue Lebas, F-49-Angers;


Sekretario: S-ro A. Ribot, Marmande;

Membroj: D-ro Albault, Toulouse; S-ro Clopeau, Sceaux; S-ino Vincent, Les Andelys.

La konsisto de la Komisiono certigas seriozan kaj valoran laboron, kaj por ni restas nur gratuli la Komisionon pro la refondiĝo kaj varme rekomendi kunlaboron.

INTERNACIA KUNVENO POR INSTRUISTOJ EN SONNENBERG

Kun la temo "Fundamentaj Homaj Rajtoj kaj Liberecoj" okazos grava internacia kunveno por instruistoj en la komforta restadejo Sonnenberg (Harz-montaro), Germanujo. Datoj: 20-29 septembro 1968. Estas la unua fojo, ke la centro Sonnenberg, jam internacie tre konata societo por akcelo de internacia kunlaboro, eksperimente akceptas Esperantokunvenon. Ĝia sukceso tre influos la prestiĝon de Esperanto en Germanujo kaj alilande. Jam promesis prelegi prof. Lapenna kaj aliaj konataj parolantoj. Kotizo: 80 g.mk. por 10 tagoj, manĝojn kaj loĝadon inkluzive. Detale informas: Helmut Sonnabend, rektoro, D-3161 Dollbergen über Lehrte, Germanujo.



La Internacia Centro Sonnenberg, 710 metrojn super la marnivelo, apud S. Andreasberg en la montaro Oberharz, Germanujo. La Centro estis fondita post la Dua Milito kiel internacia renkontiĝejo por geinstruistoj el la tuta mondo.

KONSULTA KOMISIONO PRI LERNEJOJ de UEA (asocia membro de FIOCES)

Generalaĵoj kaj rilatoj kun profesiaj instruistaj organizaĵoj: S-ro Józef Toczyski, estrarano de UEA pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

Reprezentanto de ILEI: F-ino Jeanne Dedieu, 26 Ave. de l' U.R.S.S., Toulouse, Francujo.

Pedagogiaj demandoj: S-ro R. H. M. Markarian, 2, Hazel Grove, Hartwood Park, Chorley, Lancs., Britujo; tel. 4572.

Organizaj demandoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

Eksteraj kunlaborantoj:

Rilatoj kun internaciaj instancoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx, Britujo.

Konferencoj: D-ro Peter Zlatnar, Rimska c 7/II, Ljubljana, Jugoslavio; tel. 2 03 60.

Altgrada instruado: Prof. J. Régulo Pérez, Apartado 25, La Laguna, Tenerife, Kanarioj.

Mezgrada instruado: D-ro M. Dazzini, Via Palestro 36, I-54100 Massa (M.C.), Italujo.

Elementa instruado: S-ino R. Thorsen, Dyblandsvangen 7, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

Bonvolu ĉiam turni vin al la kompetenta membro laŭ la supraj indikoj.

LIBROJ PLEJ VENDATAJ EN 1967

Jen la plej vendataj libroj en diversaj kategorioj kaj la plej vendataj diskoj laŭ la mendoj plenumitaj ĉe la Libro-servo de UEA.

ELDONAĴOJ, KIUJN UEA DISVENDAS SUB FAVORAJ KONDIĈOJ:

Lernolibroj k.s.: *Privilegia vojo* (Setälä)
Belliteraturo orig.: *La teatra korbo* (Baghy)
Bellit. trad.: *Kaukazaj rakontoj* (Lermontov)
Nefikciaĵoj: *Nederlando* (eld. Bruna)
Pri Esperanto: *Elektitaj paroladoj* (Lapenna)
Diskoj: *La feliĉo* (van Dalsem, Schoonman)
ALIAJ ELDONAĴOJ (NE DE UEA):
Lernolibroj k.s.: *Teach Yourself Esperanto*
Legolibroj: *Karlo* (Edmond Privat)
Bellit. orig.: *Ora duopo* (Baghy, Kalocsay)
Bellit. trad.: *Kvin virinoj de amo* (Saikaku)
Nefikciaĵoj: *Vortoj de prezidanto Maŭ zedong*
Pri Esperanto: *Lingvo stilo formo* (Kalocsay)
Diskoj: *Jen nia mondo* (Duo Espera)

Ni memorigas, ke la supraj listoj rilatas nur al la librovendado ĉe UEA kaj ne al la tuta Esperanta merkato, pri kiu mankas statistikoj. Aperas du apartaj listoj, ĉar ne eblas rekte kompari librojn vendatajn sub malsamaj kondiĉoj.

Listoj por 1965 kaj 1966 aperis sur paĝoj 73 kaj 27 de la jarkolektoj 1966 kaj 1967. Komparo montras, ke la diskoj "Internacia elparolo" kaj "La espero" fine cedis lokon al modernaj kantoj. "Karlo" superas en la klaso de legolibroj — sed nur pro elvendiĝo de la konata "La verda koro". Rimarkindaj estas la sukcesoj de Saikaku kaj Maŭ zedong. "Lingvo stilo formo" reokupis la lokon, kiun ĝi cedis pasintjare al "Vivo de Zamenhof".


Okuloj, novelaro de Marjorie Boulton. Eld. Stafeto, La Laguna, 1967. 177 p. 18 x 12 cm. 6,85 gld.*

"...Tamen ni faru nian devon ĝis nia lasta spiro..." — diras la ĉarma Afono en la novelo "Vespera vizitanto". Jen devizo por la novelaro, eĉ, por la tuta nuntempa originala literaturo Esperanta.

Post antaŭnelonga forpaso de niaj Baghy kaj Szilágyi, la apero de tiu ĉi libro estas kvazaŭ konsolo. Ĝi demonstracias, ke ilia spirito ne formortis: troviĝas aŭtoroj kapablaj pluporti la torĉon.

Post kelkaj lirikaj poemvolumoj, post la prozaĵoj "Kvarpieda Kamarado", "Virino ĉe la Landlimo", "Dekdu Piedetoj", tre ĉarmaj kaj rave legindaj, en "Okuloj" aperas antaŭ ni la verkisto Marjorie Boulton jam tute matura, kun fantazio vigla, psikoanalizo profundsonda, stilo multe evoluinta. La komencaj pecoj, la titoldona novelo kaj "Ebrivirgeco" jam kaptas la atenton, sed ankoraŭ entenas kelkajn stilajn

Marjorie Boulton



Jen nia mondo. Kantas Duo Espera. Eld. Iramac, Nederlando, 1967. Disko stereofona/monofona, 33 r/m, diam. 30 cm., kun tekstoj. 16,50 gld.*

La Duo Espera, tio estas konataj nederlandaj kantistoj Hanny kaj ŝia frato Adri, jen aperigas sian unuan diskon en la Internacia Lingvo. Temas pri ok kantoj verkitaj plejparte de la usonanoj Bob Dylan kaj Pete Seeger, bone tradukitaj de Wouter Pilger. La titoloj estas: Se havus mi martelon; Israela lulkanto; Venkos ni en gloro!; Ĉiuj floroj estas for; Tamen: ĉio en ord!; Kun helpo de Dio; Jen via mondo!; Blovas la vent'.

Puristoj povus plendi, ke la muzika aranĝo (akompano jen gitara, jen ĥora, jen orkestreta) kaj la voĉoj de Hanny kaj Adri estas ne tute adekvataj al la plejparte protesta aŭ satira enhavo de la kantoj (precipe ĉe "Kun helpo de Dio").

Sed la ĝenerala publiko certe bonvenigos

malglataĵojn, naciismajn vortouzojn. Poste sin prezentas al ni en plena stila matureco la profundsenca "Mezepoka historio", kun klasika koncizo kaj filozofia simbolismo. Daŭrigas la vicon kaj la suprenkliniĝon de la stilevolua diagramo, la fantaziplena "La sekreto de la lernejestrino", pri virino, havanta eksterordinaran kapablon. La talento de la aŭtorino kulminas en la sekva novelo, "Fenikso", stile kaj strukture perfekta, kiu kun drama pulsado prezentas meditadojn de astronomo. Preskaŭ egalvaloras "Vespera vizitanto": fantastika rakonto pri vizito de grandintelekta aliplanedano. Sekvas: "La venĝo-komitato", nervostreĉa historio pri puniĝo de multsperta donjuano. Temo eble iom tikle diskutveka por virlegantoj. "Tiel, kiel ĝi ne okazis" montras en tute nova, originala filozofia aspekto la konatan biblian historion pri la unua homparo. "Lernantino": apoteozo de la junecaj ardo kaj amdeziro, sufoke subpremataj de la filistre hipokrita moralinstruo. "Kaj kredu, se vi volas": kurioza rakonto pri hundo — parolanta Esperanton. "Preter la limo" estas pulse viva raporto pri vojaĝepizodo. Per sia ĵurnalismeco ĝi iom diferencas disde la karaktero de la tuto. "Nekvalifikitaj sorĉistinoj": brile sprita, "Wells-eco" fantaziriĉa, "Boulton-eco" ĉarma novelo el la vivo de universitato. Kaj fine: "Interne kaj ekstere". Poezie lirika, perle brila, larmovoke, ridetveke kortuŝa rakonteto pri kvinjara miopa knabineto, volanta vidi la stelojn.

Entute: ne nur leginda, sed legenda libro; kelkaj ĝiaj pecoj atingas nivelon de la mondliteratura supro.

Dankon ankaŭ al la eldonisto J. Régulo, kiu tra multaj malfacilaĵoj daŭre helpas la disfloradon de nia originala literaturo.

Andreo Szabó (Hungarujo)

diskon aŭde tre plezurigan, kiu estas verŝajne la plej bona ĝis nun aperinta en Esperanto.

J. C. Wells (Londono)

A Research Bibliography on Esperanto and International Language Problems (Esplorbibl. pri Esp. kaj internacilingvaj problemoj), komp. Humphrey Tonkin. Eld. JEN, New York, 1967. 14 p. 20 x 12,5 cm., ofsetita. 1,75 gld.*

En anglalingva bibliografio, celanta helpi al gimnazianoj kaj universitatanoj verki referaĵojn pri la lingvoproblemo, Tonkin listigas ĉ. 60 dokumentojn anglajn, francajn kaj Esperantajn.

Sole ne menciita estas la "Enciklopedio de Esperanto", supozeble pro elĉerpiteco; kaj tro malfrue por mencio reeldoniĝis "Historio de la Mondolingvo" de Drezen.

Troviĝas ankaŭ utilaj informoj kaj konsiloj pri esplorado kaj referado. Verketo neriproĉebla.

J. C. Wells (Londono)

Unesteno, Universala Esperanta Stenografio, de J. J. Sturzenegger kaj H. Matzinger. Eld. Mondo, Zürich, 1966. 285 p. 21 x 15 cm., bind. 17,75 gld.*

Jen aperis tre ampleksa lernolibro pri stenografio laŭ sistemo adaptita de tiu de Stolze-Schrey post longa studado kaj profunda esploro, por ke Esperanto ricevu sistemon plej taŭgan por sia strukturo.

La unua parto enhavas enkondukon kaj ĝeneralajn rimarkojn pri la maniero skribi stenografiajn signojn. Tie aperas tuj kelkaj neologismaj fakvortoj, kiuj sendube ŝokos niajn puristojn, sed kies neceso montriĝis evidenta dum la longa preparlaboro. Ekzemple: lefta, anst. maldekstra. La unua parto prezentas gradigitan, ege ekzemploriĉan lernolibron por komencantoj ("korespondskriba Unesteno"), dum la dua parto, same elĉerpe klara, prezentas "rapidskriban Unestenon" por steno-

grafiistoj, kiuj deziras plej profunde ekspluati la diversajn eblojn, kiujn prezentas tiu stenografia sistemo. Trian parton oni aldonis sur aparta roza kajereto, kun klarigaj notoj: tia prezento rimarkinde faciligas ties konsulton.

La preparo de tiu ĉi libro, t.e. de la adapto de Unesteno al Esperanto, okazis fare de multaj diverslingvaj kunlaborantoj, sub la direkto de la aŭtoroj. Tiamaniere, ĉio estis plej detale elprovita per longa korespondado, analizo de pluraj literaturaj, sciencaj kaj leksikonaj verkoj, praktika uzo de la diversaj "sigloj".

Mi mem ne kapablas stenografii, sed ĉi tiu eleganta verko, bele presita, fortike bindita, kun multnombraj ekzercoj kaj ekzemploj, preparita tiel zorge, instigas min al la lernado, kaj ĝi estas, cetere, rekomendinda al ĉiu ŝatanto de belaj libroj.

Tazio Carlevaro (Svislando)

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Nederlando, nacio en Okcidenta Eŭropo. (Eld. Ministerio por Eksterlandaj Aferoj, Den Haag, 1967). 64 p. 24 x 17 cm. Kun 85 ilustraĵoj, kelkaj koloraj. 3,50 gld. (Kiuj ne povas pagi al Nederlando, povas ricevi sub specialaj kondiĉoj ĉe L.E.E.N., Hengelolaan 5 F, Den Haag.)

Stork Hydromatic. Eld. Stork-Amsterdam, Boorstraat, Amsterdam (N), Nederlando. Pri-skribo nederlanda-angla-germana kun Esperanta resumo: "Kontinusteriligado en la farmaceŭta industrio".

Esperanto. Lingvo Internacia, de Aleš Berka. 2-a eld. Kroužek Esperantistů při SZK Sklář, Vsetín-Ohrada. 1967. 97 p. 20 x 14 cm. 1500 ekz. Lernolibro por ĉeĥoj.

Ni parolu Esperanton. Longedaŭra sonbendo por uzo kun la samnoma lernolibro (precipe taŭga por lingvo-laboratorioj). Bobeno 13 cm. diam., rapido 9,5 cm/s. 11,75 gld.*

Ni parolu Esperanton. Filmstrio nigra-blanka por uzo kun la samnoma lernolibro. Enhavas ĉiujn ilustraĵojn de la libro. 4,90 gld.*

La ebura kombilo, noveloj de 5 aŭtoroj. Liberigo-Eldonejo, Sud-Vjetnamio, 1967. 160 p. 19 x 13 cm., ilustr.*

Korespondu! letermodeloj de V. Benczik. Eld. Hungara Esperanto-Junularo, 1967. 15 p. 14 x 10 cm. 1,2 st.

Meĉunarodni jezik Esperanto, lernolibro serba de Gvozden Sređić. Dua eld. (antaŭe: "Esperanto za ŝelezniĉare"), Jugoslavia Asocio de Fervojistoj E-istoj, Beograd, 1967. 229 p. 16 x 12 cm., ilustr.* 4,50 gld.

Memkritiko. Red. Victor Sadler. Eld. Koko, 1967. 60 p. 18 x 13 cm., bind. 5,- gld.* Poemaro.

La partipoj en Esperanto, de G. F. Makink. Eld. la aŭtoro, Eekhoornlaan 10, Wageningen, Nederlando. 1967. 20 p. 30 x 21 cm., multobl. Prezo ĉe la aŭtoro: 4 rpk.

Monosilaboj, 14-silabaj sonetoj de Diderto Freto. Eld. Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro, 1967. 45 p. 19 x 14 cm.

Paroloj al miaj gefiloj, religiaj konsiloj de Walter Francini. Eld. Suda Stelaro, Campinas, Brazilo, 1967. 40 p. 16 x 12 cm. 1000 ekz.

La teksto unua. Eld. Japana Esperanta Libro-kooperativo, Oosaka, 1967. 30 p. 19 x 13 cm. Internacia elementa lernilo.

Katalogo pri Esperanto-poŝtmarkoj, de Váňa vladimir. Eld. EKI, Malmö, 1967. 21 p. 30 x 21 cm., multobl., ilustr.

Ulenspiegel, tio estas Strigspegulo. Tr. P. Wolrug. Eld. Vulpo, Amsterdam, 1967. 15 p. 14 x 10 cm., ilustr.

ABC de la Internacia Lingvo Esperanto, de Theodor Kilian. Eld. Osvětový dům B. Václavka v Třebíči, Ĉeĥoslovakujo, 1967. 54 p. 17 x 12 cm. Lernolibro por ĉeĥoj.

1968 (Kalendaro). Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 313, Pekino. 13 p. 38 x 26 cm., kolor-fotoj.

Technisches Wörterbuch Deutsch-Esperanto (Teknika vortaro germana-Esperanta), de Rudolf Haferkorn. Eld. Esperanto Press, Kanado, 1967. 84 p. 16 x 12 cm., ofsetita.

Ĉiujn eldonaĵojn signitajn per steleto oni mendum ĉe UEA, la aliajn ĉe la koncerna eldonejo.

NEKROLOGOJ

IGNÁC BALLA

Mortis en Budapeŝt d-ro Ignác Balla, dum jardekoj delegito en Pécs, lastatempe FD en Budapeŝt.

MARIA LUISA FIORE

Nur 31-jara forpasis en Bologna, Italujo, profino Maria Luisa Fiore, MA de UEA.

PERSONE

Ogwuazor

● Nigeria diplomato Philip Ogwuazor, malnova membro de UEA, okupis novan oficon en Kinshasa, Kongo.

Simpkins

● Eks-bankoficisto W. L. Simpkins, dumviva membro de UEA, jam la kvaran fojon ĉirkaŭvojaĝas la mondon kun helpo de Esperanto de post sia emeritiĝo. Laste li gvidis kursojn survoje tra Usono.

Steiner

● La 26-an de februaro atingas sian 90-an datrevenon s-ro Hugo Steiner, la fondinto de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

Unger

● UEA-membro d-ro Hj. Unger, prezidanto de la Svisa Unuiĝo de la Ĵurnalistoj de la Turismo, elektigis kiel unu el 18 korespondaj membroj de "Académie Internationale du Tourisme" (patrono: Princo Rainier de Monako).

LOKE

Arabujo

● Araboj en UAR, Irako kaj Sirio sekvas la korespondan kurson de s-ro H. M. Al-Amili, subtenanta membro de UEA en Bagdad, kiu celas fondi tut-araban Esperanto-organizaĵon.

Japanujo

● Ĉe la organizaĵo Oomoto aperis detaligita propono, ke en 1970, somere en Kioto, okazu Pacifika Esperanto-Kongreso, kiun partoprenus ĉiuj landoj laŭlonge de Pacifiko.

● Ĉirkaŭ mil personoj partoprenis funebrajn kunvenojn en Oosaka, Nagoya kaj Tokio honore al la sinmortiginta s-ro Ĉunoŝin Jui (vidu januaro, p. 5). Pri lia morto skribis preskaŭ ĉiuj gazetoj. Semajnavuo de Asahi publikigis lian taglibron, tradukitan el la Esperanta originalo.

Jugoslavio

● La studenta klubo en Zagreb festis sian 10-jaran datrevenon per kultura programo, en kiu elstaris "La urso" de Ĉeĥov kaj monologoj de Krleža kaj Matković. En tiuj 10 jaroj SEK faris i.a. 41 kursojn kun pli ol 1000 anoj, 40 prelegojn en lernejoj, 2000 paĝojn da literaturaj tradukoj.

Norvegujo

● Kunlabore kun la loka Esperanto-klubo la Hispana Ŝtata Turisma Oficejo en Oslo okazigis je siaj kostoj ekspozicion, gazetaran konferencon k.a. pri la 53-a Universala Kongreso en Madrid.

Rumanujo

● Malgraŭ la oficiala negativa sinteno al Esperanto en Rumanujo, favora artikolo okaze de la 80-a datreveno aperis en la grava semajnavuo pri internaciaj aferoj "Lumea", kiun eldonas la landa Unuiĝo de Ĵurnalistoj. Ankaŭ aliaj, ekz. la ilustrita revuo "Flacara", raportis pri la UK en Rotterdam.

Soveta Unio

● Korespondan kurson de Esperanto komencis la latva revuo "Zvaigzne", kun eldonkvanto de 112 000 ekz, ekde 20 nov 67.

Usono

● Dungitino de la aerhaveno Tacoma (okcidenta marbordo) ricevas ekstraĵajn 50 dolarojn monate pro scipovo de Esperanto.

FAKE

Fervojo

● Ekde la somero de 1968 ankaŭ la Italaj Ŝtataj Fervojoj uzos Esperanton en sia horaro. Ĝis nun la horaro havas informojn kaj klarigojn en la itala, angla, franca, germana kaj hispana lingvoj.

Literaturo

● Norda Prismo plu aperos! La redaktadon provizore transprenis s-ino Roza Szilágyi, Döbelnsgatan 66, Borås, Svedujo — vidvino de la bedaŭrata d-ro Ferenc Szilágyi. S-ro M. Groth, Danlando, funkcios kiel redaktista sekretario.

Politiko

● Jam kompletigis la unua (entute 96-paĝa) jarkolekto de la kvaronjara revuo "Mondano", "dediĉita nur al mondcivitaneco kaj tiurilataj problemoj". La revuo estas bele presita kun fortika kovrilo kaj jam kolektis al si internacian kunlaborantaron. Abonebla per UEA; kotizo 25 steloj (6,25 gld.) jare.

P.T.T.

● Regule aperadas jam unu jaron la monata organo "Heroldo" de Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanta Asocio (P.k. 25, Sofio, Bulgarujo). La bone redaktata bulteno enhavas i.a. terminaron Esperantan-anglan-germanan-rusan.

Skoltoj

● Venontan someron en Britujo okazos Internacia Skolta Ĵamboreo kun partoprenantoj i.a. el Aŭstrujo, Germanujo, Italujo, Nederlando kaj Norvegujo. La Organizanta Komisaro, kiu dum jaroj supozis, ke sufiĉas la angla lingvo, nun ŝanĝis sian opinion, kaj la Ĵamboreo uzos Esperanton kiel oficialan lingvon apud la angla. Ĝi jam rekomendas al ĉiuj aliĝantoj lerni la Internacian Lingvon.

Teatro

● Premieron en Zagreb havis la 20-an de decembro dramo de Emilija Lapenna, "Ĉiutagaĵo", pri konfliktoj inter la generacioj. Rolis Nevenka Imbert, Jure Lipovac, Vesna Staničić kaj Velimir Majdak. Ĉeestis ĉ. 100 personoj.

Turismo

● La Unuiĝo Internacia de Oficialaj Organizaĵoj Turismaj, al kiu estis direktita la rezolucio de la Tria Sekcio de la UK en Rotterdam, komunikis la rezolucion en la angla, franca kaj hispana al la registaroj-membroj per cirkulera letero n-ro 17 de novembro 1967. Pluraj gravaj turismaj gazetoj jam publikigis la tekston de la rezolucio.



LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando**

JAM PRESKAŬ LIBERTEMPO ESTAS

Jam nun preparu viajn partoprenojn printempajn kaj somerajn. La ebloj abundas:

4-a Renkontiĝo de Eŭropa Esperantista Junularo, en Montecatini. Itala Esperanto-Junularo preparas por vi programon kun prelegoj kaj diskutoj, ekskursoj kaj bankedoj, kulturaj prezentadoj kaj seminario por gvidantoj. La aranĝo ricevis la aŭspicion de TEJO, kio garantias valoran programon kaj akuratan organizon. La temo rilatos al Eŭropaj demandoj, ekonomiaj, sociaj aŭ kulturaj. Datoj: 10-16 aprilo. Kotizoj: 2500 liroj por aliĝo (eksterlandanoj aliĝas senpage!), kaj 12.600 liroj por la kompleta restado. Antaŭpago necesas de 3.000 liroj sendendaj kun la aliĝilo al: 4-a Renkontiĝo de Eŭropa Esp-ista Junularo, ĉe Ente Provinciale per il Turismo, Corso Gramsci 110, 51100-Pistoia, Italujo.

13-a Internacia Junulara Kunveno, en Aachen. GEJ, en kunlaboro kun BEJA, JEFO kaj NEJ aranĝos sian printempan IJK 1968 de 6 ĝis 13 aprilo en la bela junulargastejo de Aachen. Temo: "Eŭropo muzikas". Belvoĉaj prelegoj, diskoj kaj (eble) publika koncerto, folkloraj kaj alispecaj dancoj, atendas vin. GEJ ankaŭ volonte ricevos antaŭ 15 febr. ŝatatajn kantojn el Eŭropo, en Esp.-traduko, por sia eldonota kantaro.

Kotizoj: ĝis-25-jaruloj pagas 65 GM ĝis 15 febr., poste 70 GM. Ili rajtas rabaton de 3 GM por ĉiu restad-tago + duono de la vojaĝelspezoj en FRG, aŭ (laŭ propra elekto) de 5 GM por ĉiu restadtago. Personoj super 25 j. aĝaj pagas 75 GM ĝis 15 febr., kaj 80 GM poste. Por ili ne validas rabatoj. Aliĝu al GEJ, H. Behrmann, Volksschule Süd, 4972 Löhne-Obernbeck, sendante samtempe antaŭpagon de 20 GM al pĉkk. Karlsruhe 54577, por "Deutsche Esperanto Jugend, 44 Münster". Seriozaj interesiĝantoj el orienteŭropaj landoj bonvolu rekte kaj rapide turni sin al U. J. Moritz, Hafenstrasse 75, 44 Münster, por akiri invitleteron.

Seminario por gvidantoj de NEJOj kaj TEJO en Aachen. La pasintjara seminario en Bruselo, kie partoprenis reprezentantoj de pluraj esperantistaj kaj ne-esperantistaj junularaj organizaĵoj (NEJOj), ripetigos nun en la kadro de la 13-a IJK de GEJ. La datoj kaj aliĝkondiĉoj estas samaj kiel por la 13-a IJK, nur la kotizo por la seminario aldoniĝas, je 10 GM. La programo havos laboran karakteron (anstataŭ tiu de la IJK, kiu estas ĉefe feria). Ĝi konsistos el mallongaj enkondukoj, praktikaj ekzercadoj, diskutoj kaj demonstracioj pri la temoj: 1)

Librotenado, financaj raportoj, buĝetoj, subvencioj; 2) Administrado: metodoj kaj teknikoj; 3) Publikaj rilatoj, difino de agado kaj la konsekvencoj por la alekstera prezentiĝo; 4) Redakta laboro; 5) Gvidado de diskutoj kaj kunsidoj.

La lingvoj uzeblaj estos Esperanto, germana, franca aŭ angla. Petu broŝuron kaj aliĝilon de: B. Kreykenbohm, Roermonder Str. 4, 5101-Richterich bei Völs, FRG.

3-a kaj 4-a Internaciaj seminarioj de Studenta Scienca Rondo Esperantista, en Łódź (1-4 aprilo) kaj Torun (4-7 apr.) pri la temoj: "Studentaj problemoj", kaj "Nikolao Kopernik". Kotizo 300 zł. Detalajn informojn peras la Tur. Servo de TEJO, ul. M. Curie-Sklodowskiej 10/3, Bydgoszcz 9, Polujo.

Internacia Kultura Festivalo de Esp-ista Junularo, en Dunaujvére, Hung., de 3 ĝis 7 aprilo. Petu informojn de Hungara Esp. Junularo, Kenyérmező u. 6, Budapest VIII.

Unua Internacia Kulturfestivalo de PEJ, en Sieraków, 28 apr. – 1 majo. Programon de kantoj, recitaĵoj, oratoraĵoj, teatraĵoj, tie preparas Vojevodja estraro de PEJ, Pk. 1016, Poznań 2, Polujo.

24-a Kongreso de TEJO, en Tarragona, de 27 julio ĝis 3 aŭg., nun anoncis la kotizojn. Ili estas (en usonaj dolaroj):

	antaŭ 1 apr.	post 1 apr.
kongresanoj ĝis 20 j.	26	28
super 20 j.	30	32
gastoj (pli ol 25 j. nemembroj)	38	38
simbolaj aliĝintoj	5	5
Individuaj membroj de UEA en la kategorioj JMA kaj MA-K havas rabaton de 2,80 dol.		
Aliĝu al: HEJS, Arce 8-2-4, Cornella (Barcelona).		

LA REDAKTORO

kore dankas pro ĉiuj afablaj bondeziroj ricevitaj kaj aparte pro tiu de la Edinburga studentaro esperantista. Li sincere recipokas.

INFORMBULTENO

Jam dum tri jaroj la NEJO-komisiono de TEJO eldonadas dumonatan informbultenon en la angla kaj franca lingvoj por NEJOj. Ankaŭ la funkciuloj, kiuj ricevadas la internan informbultenon "InFo", kutime trovas tiun bultenon (IGS) kun la InFo.

Ek de 1968 la sekretaria komisiono de TEJO eldonos malgrandan novaĵbultenon en Esperanto, kiu paralelos tiun en la angla kaj franca lingvoj, kaj estos distribuata al la gazetaro, radio-stacioj esp-istaj, ktp. Ĉiu rajtas sendi informojn pri junulara esp-ista vivo. Poŝtkarto sufiĉas, ĉar la maksimuma amplekso estas 120 vortoj por informo. Ĝi estu en konciza kaj bona Esperanto, sur unu flanko de la karto tajpita, kun indiko de la dato.

Adreso: H. Tonkin, Department of English, University of Pennsylvania, **Philadelphia**, Pa 19104, Usono.

INTERNACIA

EKZAMENA KOMISIONO

En la sesio, kies Skriba kaj Parola Partoj okazis en la kadro de la 11-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo (Würzburg, 27 dec - 3 jan), sukcesis la kandidato s-ro Reinhard Haupenthal el Sulzbach, Germanujo, kun tre bona skriba parto. La kandidato nun rajtas prezenti sian disertacion, de kies prijuĝo dependos la fina rezulto de la ekzameno.

La Internacia Ekzamena Komisiono denove ekzamenos kandidatojn en Madrid okaze de la UK. Povas esti allasita nur persono, kiu sukcese finis per diplomiĝo minimume mezgradan lernejon kaj kiu plene posedas la Internacian Lingvon. Ĉiu, kiu deziras kandidatiĝi, bonvolu sendi kiel eble plej frue (limdato la 1-a de majo) al la Sekretario de la IEK (S-ro J. C. Wells, 33 Rye Hill Park, London S.E. 15, Britujo): esperantlingvan tradukon de la diplomo pruvanta, ke la kandidato finis mezlernejon (la ĝusteco de la traduko devas esti konfirmita de kompetenta instanco) kaj ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno de Esperanto en sia lando, aŭ alian pruvon pri plena posedo de la lingvo. La kotizo por la ekzameno estas 7,20 gld. (28,80 steloj) aŭ egalvaloro, kaj devas esti pagita samtempe. Por kandidato, kiu pro registaraj reguloj absolute ne povas antaŭpagi la kotizon, sed kiu vere atendas ĉeesti la Kongreson, ekzistas ebleco de speciala aranĝo.

Laŭ la Regularo de IEK, sukceso en la ekzameno, devas "atesti, surbaze de rigora ekzameno, la kapablon instrui Esperanton je supera nivelo". Kandidatoj do atendu ekzamenon, kies kriterioj similas tiujn por universitata diplomo. Detala regularo kaj listo de rekomendita literaturo estas ricevebla de la Sekretario de la IEK aŭ de la C.O. de UEA.

53-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Madrid, 3-10 aŭgusto 1968

Alta Protektanto: Ĉef-Generalo Francisco Franco, Ŝtatestro de Hispanujo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 5 Rotterdam, la 11-an de jan. 1968

Dua Bulteno

En februaro estas sendata al ĉiu aliĝinto la Dua Bulteno. En ĝi troviĝas, krom ĝeneralaj informoj, indikoj kaj mendiloj por loĝado, ekskursoj, bankedo, Infana Kongreseto ktp.

Enirvizo

Kongresanoj el landoj, por kiuj estas postulata hispana enirvizo kaj en kiuj ne troviĝas hispanaj diplomaciaj reprezentantoj, bonvolu informi la Lokan Kongresan Komitaton, plej malfrue 30 tagojn antaŭ la forvojaĝo, pri la lando, ĉe kiu ili deziras ricevi la hispanan enirvizon. Nur ricevinte ĝustatempe tiun informon LKK povas certigi rapidan liveron de la enirvizo.

Oratora Konkurso

La temoj ĉi-jare estas jenaj:

a) Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj (Art. 1, Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj).

b) Egaleco de la seksoj en la Univ. Dekl. de Homaj Rajtoj.

c) La fenomeno de "florinfanoj".

Pliaj temoj estas decidotaj.

Ekskursoj

Okazos tri samtempaj tuttagaj ekskursoj al Toledo, Segovia kaj "El Escorial". Detaloj en la Dua Bulteno.

Loĝiga servo

Por la kongresanoj estas rezervitaj lokoj en diverskategoriaj hoteloj. La prezoj varias de 9,— gld. (en moderna studenta loĝejo) ĝis 40,— gld. (en luksa hotelo). Detaloj en la Dua Bulteno.

Ĝeneralaj Kunvenoj

Dum la Kongreso okazos du Ĝeneralaj Kunvenoj de UEA, el kiuj la unua havos kiel temon "Kulturaj rajtoj kaj lingva diskriminacio laŭ la Universala Deklaracio".

Statistiko (je 18 jan 68)


Arg. 1, Aŭstral. 3, Aŭstr. 5, Bel. 24, Bra. 4, Bri. 27, Bul. 22, Ĉeĥ. 7, Dan. 13, Fin. 9, Fra. 118, Ger. 38, Gre. 1, His. 215, Hun. 12, Isl. 2, Isr. 5, Ita. 38, Jap. 7, Jug. 52, Kan. 3, Mek. 2, Monako 4, Ned. 38, Nor. 9, Nov-Z. 1, Pol. 13, Portu. 13, Sov. 1, Sve. 24, Svi. 5, UAR 1, Uru. 1, Usono 18. Entute: 736 el 34 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

La Kongresejo "Palaco de la Sindikatoj"





MAŬRA ARTO EN HISPANUJO

Restaĵoj de la longa araba influo en Hispanujo estas ankoraŭ vaste troveblaj. Kongresanoj, kiuj decidis viziti ankaŭ la urbon Sevilla, povos admiri inter aliaj majstroverkoj ĉiu tiun korton de la "Alcazar".

MEMORIGA KALENDARO

Februaro

3-10; 10-17 Int. Skisemajnoj, Innsbruck, Aŭstr.

Marto

2-3 Jarkunveno Svisa Esp.-Soc., Aarau
9 Int. Komerca Renkontiĝo, Foiro Leipzig
31 Limdato de Belartaj Konkursoj de UEA
Kotizoj por UK Madrid plialtiĝas

Aprilo

1-4; 4-7 Int. Seminarioj PEJ, Łódź-Toruń, Polujo
3-10 Int. Studsemajno apud Hameln, Germ.
Int. Jun. Kulturfestivalo, Hungarujo
4-11 Kultura Semajno en Grésillon, Francujo
6-13 Int. Jun.-Kunveno de GEJ, Aachen, Germ.
10-16 Itala Kongreso en Montecatini
Eŭropa Jun. Renkontiĝo, Montecatini
11-14 Argentina Jarkunveno, Rio Ceballos
12-15 Brita Kongreso en Manchester
12-16 Franca Kongreso en Aix-en-Provence
22-12/5 Int. Konf. Homaj Rajtoj, Teheran
28 UEA fondita antaŭ 60 jaroj
30 Limdato kandidatigo Int. Ekzameno

LA POŝTMARK-KOLEKTADO

kreskis en 1967 per ĉ. 25%. Premiitoj estas:

- 1) Kiel kutime la nov-zelandaj esperantistoj pere de s-inoj Rita Aagaard kaj Y. M. Canty.
- 2) Oomoto, Japanujo.
- 3) S-ro Conrad Fisher, Meadville, Usono.
- 4) S-ro R. Jelenc, Châtellerault, Francujo.
- 5) S-ro Ch. Lavissee, Nancy, Francujo.

Koran dankon al ĉiuj kontribuintoj, entute 68 personoj. Dependas de niaj legantoj, ĉu la kolektado kreskos ankaŭ en 1968. Sendu daŭre ĉiaspecajn poŝtmarkojn al:

Peter Zacho, Åmosevej 5 A, Kopenhago 2700 Brh., Danlando.

Kiam vi skribas al UEA, profitu la okazon por sendi samtempe en la koverto kelkajn uzitajn poŝtmarkojn. UEA trassendos al s-ro Zacho, kiu vendos la poŝtmarkojn por kreskigi la enspezojn de UEA.

20-a KONGRESO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO

(Aliĝinta faka asocio de UEA)

Varna, Bulgarujo, 11-17 maj 1968

Adreso: Poŝtfako 350, Sofia, Bulgarujo.

Kotizoj: Ĝis 31 mar 68: 8 us. dol. (12,48 rubloj).
Post tiu dato: 10 dol. (15,60 rubl.).

Bankkonto: No. 19/2591 DSK Kolarovski rajon, Sofia, Bulgarujo.

Loĝado: Mendilo estas ricevebla ĉe la supra adreso.

Ekskursoj: i.a. al Nesebâr, Balĉik, Istanbul.

Glumarko: Trikolora glumarko kostas po 0,50 dol. (0,78 rubl.) por 50 pecoj.

Majo

11-17 IFEF-Kongreso, Varna, Bulgarujo
18-19 Ornitologia Semajnfino, Eindhoven, Ned.
19-21 Bulgara Kongreso, Varna
25 Nederlanda Jarkunveno LEEN, Utrecht
31-4/6 Germana Kongreso en Munkeno

Junio

15-16 Aŭstra Renkontiĝo en Salzburg
15-24 Int. Renkontiĝo, Poděbrady, Ĉeĥ.
25 Limdato por aliĝo al UK Madrid

Julio

4-25 Kulturaj Semajnoj en Grésillon, Fr.
7-20 Int. Kursoj en Piešťany, Ĉeĥoslov.
15-25 Int. Turista Kongreso, Szeged
18-25 Int. Semajno en Drôme, Francujo
22-29 Int. Seminario por Gvidantoj, Grésillon
25-1/8 Kongreso IKUE/KELI, Limburg, Germ.
27-3/8 TEJO-Kongreso en Tarragona, Hisp.

Aŭgusto

3-9 SAT-Kongreso en Utrecht, Nederlando
3-10 Universala Kongreso en Madrid, Hisp.
10-15 Oficiala Postkongreso en Zaragoza, Hisp.
16-23 STELO-Kongreso, Aix-en-Provence, Franc.
25-31 Eŭropa Ferio-Semajno, Gwatt, Svisujo

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1967

stato je la 31-a de decembro 1967

REZULTO

Konkurso I

Lando	kvoto	poentoj	%
1 Japanujo	3965	3845	96,77
2 Hispanujo	3250	3020	92,92
3 Italujo	4220	3860	91,47
4 Francujo	7752	6874	88,67
5 Belgujo	2055	1800	87,59
6 (7) Nederlando	5975	5161	86,38
7 (6) Svedujo	7180	6150	85,65
8 Danlando	3099	2636	85,06
9 Germanujo	7221	6055	83,85
10 Usono	4526	3775	83,43
11 Britujo	6691	5464	81,66
12 Finnlando	3160	2365	74,84
13 Svislando	2459	1745	70,96
14 Brazilo	3856	2507	65,02
15 Jugoslavio	5375	3410	63,44

Konkurso II

1 Grekujo	270	365	135,19
2 Kanado	1124	1321	117,53
3 (4) Israelo	595	620	104,20
4 (3) Islando	250	260	104,—
5 Aŭstrujo	1475	1265	85,76
6 Aŭstralio	1475	1169	79,25
7 Sudafriko	260	200	76,92
8 Nov-Zelando	1481	1128	76,16
9 Norvegujo	1755	1266	72,14
10 Argentino	905	540	59,67
11 Madagaskaro	250	143	57,20

(Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn)

Ni varme gratulas pro la venko Greklandon, kies asociaj membroj plimultiĝis de 116 en la pasinta al 200 en la nuna jaro. Je ĝia dispono estas, kiel kutime, libropremio en la valoro de 100,— gld (400 steloj). Ni kore esperas, ke el la pli granda nombro da asociaj membroj en la nova jaro multaj fariĝos ankaŭ individuaj membroj de UEA.

Ni komencis nian komenton per la Dua Konkurso, la pli ĝojiga. En la Unua Konkurso je la supro troviĝas Japanujo, kiun landon ni kore gratulas, sed samtempe ni devas konstati la bedaŭrindan fakton, ke neniuj lando en tiu Konkurso atingis la limon de 100%. Tio signifas, ke la libropremio ĉi-jare ne povas esti aljuĝita en la Unua Konkurso.

Ni alvokas al ĉiuj niaj ĉefdelegitoj kaj perantoj plej energie varbi en la jaro 1968, por ke la rezulto de la ĉi-jaraj konkursoj montru ciferojn nur super 100%!

Jen la reguloj: Kiel kvoto validas la meza poentaro, kiun ĉiu lando atingis en la lastaj kvin jaroj. La poentojn oni kalkulas jene: AM = 1 poento; MJ kaj J-MJ = 5 pt.; MA, MA-K kaj J-MA = 10 pt.; MS = 15 pt.; Pat. kaj DM = 50 pt.

Grandan sukceson deziras al vi

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1967)

Aŭstrujo. Saalfelden.

Belgujo. Dave.

Britujo. Altrincham. Hemsworth. London: VD (E. 4).

Francujo. Bruyères.

Hispanujo. San Feliu de Llobregat: FD. Valladolid: FD (Kino).

Hungarujo. Budapest: FD (Juro).

Nederlando. Alkmaar: FD (Religio). Den Haag: D & FD (Statistiko).

Svedujo. Borås: FD (Lit.).

Usono. Hyattsville. San Mateo: VD. Washington: FD (Elektrotekniko).

NOVAJ DELEGITOJ

Aperos en la Jarlibro 1968/I, nun preparata.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Boulet, s-ino Josette, Francujo (DM-Jarlibro).

Järvinen, f-ino Sirkka, Jyväskylä, Finnlando.

Laskowski, s-ro André, Lund, Svedujo.

Nijhoff, s-ino A. C. T., Hilversum, Nederlando.

Platz, s-ro Hans-Dieter, 6731 St. Martin, Germ.

Schreier, s-ro H., 67 Ludwigshafen, Germanujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1968

9 Bagger, s-ro P.; 10 Blume, s-ro Arne; 11 Christensen, s-ro H. Monrad; 12 Hansen, s-ro E.; 13 Hou, s-ro C. H.; 14 Jensen, s-ro H. E.; 15 Jensen, s-ro J. P.; 16 Kehlet, s-ro Torben; 17 Kustos, s-ro G.; 18 Lange, s-ro Otto C.; 19 Larsen, s-ro S.; 20 Møller, s-ro P.; 21 Pedersen, s-ro J.; 22 Riisbjerg, f-ino G.; 23 Rude, s-ro Victor; 24 Trier, s-ro Bent Sejr, Danlando. 25 Belhoste, s-ro L.; 26 Bernard, s-ro R.; 27 Dabiez, s-ro H.; 28 Larglantier, s-ro Georges, Francujo. 29 Narvala, s-ro N. G.; 30 Vilkki, s-ro Joel, Finnlando. 31 Bily, s-ro Harry; 32 Fritsch, d-ro Erdmann; 33 Grundhoff, s-ro J.; 34 Gründler, s-ro Martin; 35 Hilland, s-ro J.; 36 Hölscher, s-ro Erich; 37 Jolliet, s-ro Leo; 38 Kaukal, s-ro W.; 39 Knauss, s-ro Wilhelm; 40 Kraft, s-ro T.; 41 Volk, s-ro Friedrich; 42 Wagner, s-ro Hermann, Germanujo. 43 Majcenović, s-ro Mijo, Jugoslavio. 44 Archell, s-ro Reginald S.; 45 Clark, f-ino Mary A.; 46 Henderson, s-ro Douglas C.; 47 Henderson, s-ino Dorothy M.; 48 Lewis, s-ro H. J.; 49 Maier-Bevel, s-ino A. L., Kanado. 50 Holleman, s-ro J. V.; 51 Laverman, f-ino A. A.; 52 Mast, s-ro J. L.; 53 Muller, Jr., s-ro J. L.; 54 Postma, f-ino Tj.; 55 Wekker, f-ino Enid, Nederlando. 56 Ribeiro da Cruz, s-ro Antonio, Portugalujo. 57 Almén, s-ro Helmer; 58 Almén, s-ro P.; 59 Andrén, s-ino Ester; 60 Bengtsson, s-ro Karl; 61 Björklund, s-ro F.; 62 Dahl, s-ro Einar; 63 Frode, s-ro O.; 64 Johansson, s-ro Erik; 65 Karlsson, s-ro Henrik; 66 Moberg, s-ro Karl J.; 67 Möllestad, s-ro Sven; 68 Olsson, s-ro S.; 69 Pettersson, s-ro N. G. Folke; 70 Wedholm, s-ino Anna, Svedujo. 71 Ammann, s-ro Karl; 72 Grossmann, s-ro H. W.; 73 Grutter, s-ino L., Svisujo. 74 Beard, s-ro Ralph H.; 75 Fineberg, s-ro Allan; 76 Ledeen, s-ro H.; 77 Nace, s-ro Paul E.; 78 Oehler, s-ro René; 79 Palermo, s-ro V.; 80 Solzbacher, d-ro William; 81 Thomson, s-ro Ken, Usono.

oficiala inform
n-ro 409, 1 jan.

esperar
februaro 19

DONACOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)

Nederlando: Beekhuysen, s-ro B. R., 5,50.
Svedujo: Almén, s-ro H., 6,85; Carlén, s-ro E., 40,—; Möllestad, s-ro Sven, 10,41.

POR VASTIGO DE LA AGADO (Gld.)

Svedujo: Anderson, s-ro Gustav, 17,36.

FONDAJO CANUTO

Italujo: Minnaja, s-ro Luigi, 4 MA.

Ĉiu kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto omaĝe al la prezidinto de UEA, prof. d-ro Giorgio Canuto. En tiu ĉi jaro la Fondaĵo estas uzata ĉefe por pagi kotizojn de sindonaj novaj esperantistoj en Azio kaj Afriko.

DONACO POR INTERNACIA ARTA TEATRO

Italujo: Minnaja, s-ro Luigi, 50,— gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.
M. H. Vermaas,
Direktorino, C.O.

DANKO PRO BONDEZIROJ

La Centra Oficejo de UEA en Rotterdam kaj la Oficejo de CED en Londono tutkore dankas al ĉiuj individuoj kaj organizaĵoj, kiuj ankaŭ ĉi-jare sendis jarfinajn bondezirojn kaj salutojn. Respondi al ĉiuj individue estus neeble, sed per ĉi tiuj linioj UEA kaj CED sincere reciprokas la salutojn kaj deziras al ĉiuj siaj membroj kaj kunlaborantoj feliĉon kaj sukcesan laboron en 1968!

NONCETOJ

i plenumo de mesoj en anoncetoj pondecas sole nur inoncintoj.)

La Esperanto-Grupo Ateneo Jovellanos de Gijón (Asturias, Hispanujo) okazigos Filometikan Internacian Ekspozicion (alumetskatoloj) je la komenco de marto 1968. Ni petegas al la tutmonda samideanaro sendi amase alumetskatolojn ĉiaklasajn. Kunlaborantoj ricevos Gijon-an rememoraĵon.

Vizitu Hispanujon sen lingvaj problemoj pere de Esperanto. Poŝvortaro Esperanta-hispana kaj hispana-Esperanta. Sendu ses respondkuponojn al Hispana Esperanto-Instituto, Apartado 2428 Barcelona, kaj vi ricevos ĝin per rekomendita poŝto.

Interŝanĝi poŝtmarkojn tutmonde deziras Wacław Piech, 42-jara oficisto, Czystochowa ul. Jasnogórska 25a, Pollando. Respondo certa.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun Aŭstrujo, Francujo, Islando. Donas germanajn okcid. Geo Borngässer, D-62 Wiesbaden, Lehrstrasse 27, Germanujo.

Indonezia samideano Eriko Sunardo (antaŭe: Kho Khwat Liat) anoncas sian novan adreson: 10, avenue Alphonse XIII, Paris 16, Francujo.

Laŭ informo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, en Rio de Janeiro, la federacia deputito Arnaldo Nogueira petis al la Ministerio pri Edukado, en la 23a de novembro, oficialan informon rilate al la Esperanto-instruado en la brazilaj lernejoj. Oni petegas urĝe sendi salutkartojn por kuraĝigi lin tuj prezenti leĝprojekton al la Ĉambro de Deputitoj. Bonvolu skribi al la jena adresoj: Dep. Arnaldo Nogueira, Câmara dos Deputados, Brasília, DF, Brazilo.

Interesas al mi kelkaj malnovaj numeroj de La Praktiko. Bv. skribi al s-ro R. Molera, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Helpu nin. Nova Nov-Zelanda klubo — la Esperanto-Klubo Hawkes Bay — aranĝos propagandan elmontron dum februaro-marto 1968 por pruvi, ke Esperanto ja estas mondlingvo. Sendu al ni multnombre ĉiajn revuojn, gazetojn, ilustritajn poŝtkartojn, poŝtmarkojn ktp. S-ro R. Harding, 21 Hammond Street, Taradale; aŭ al la sekretariino, s-ino E. Hickey, 54 Menin

Road, Napier; aŭ al la Prezidanto, s-ro S. B. Darling, 1214 Norfolk Crescent, Hastings. Ni garantias respondon al ĉiu sendonto.

Kultura Kooperativo de Esperantistoj nin informis, ke la radistacio "Jornal do Brasil", en la populara fako "Pergunte ao João" (Demandu al Johano), de antaŭ sep jaroj disvastigas Esperanton tra la tuta lando. La kreinto de la programo meritas ricevi kuraĝigajn salutkartojn de la tutmonda esperantistaro. Adreso: S-ro João Evangelista, Rádio Jornal do Brasil, Av. Rio Branco 110, Rio de Janeiro, Brazilo.

Religia kaj katolika literaturo estas mendebla ĉe la eldonejo EKUMENA ESPERANTO, CH-9106 Zürchersmühle, Svislando. Petu libroliston.

Kial Ne? La inteligenta Esperanto-gazeto por modernaj gejunuloj. Leginda — pensiga — satirema. Unuvorte — la sola gazeto por raciaj homoj. Jarkotizo: 20 steloj/10 ŝilingoj. 'Kial Ne?', 2 Edwina Gardens, Redbridge, Ilford, Essex, Anglujo.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Graĵoj en Vento". Unikaj en la mondo! Graĵoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Ĉu vi estas ĝuste informita pri la katolika eklezio kaj ĝia tutmonda agado? Abonu la organon de I.K.U.E., ESPERO KATOLIKA. Jarkotizo svisaj fr. 13.— Mendebla ĉe: Centra Oficejo de IKUE, CH-9106 Zürchersmühle, Svislando.

La Poŝtmark-kolektado daŭras. Propono: sendu poŝtfreŝajn seriojn de via lando. Tiaj ofte havas pli da valoro, ol tio, kion vi mem pagis por ili. Sendu daŭre al Peter Zacho (por UEA), Amosevej 5 A, Kopenhago Brh., Danlando.

Nun havebla...

ESPERANTO-ANGLA VORTARO

de
Montagu C. Butler

AKADEMIANO

GISDATA VERKO, en kiu la kompilinto mal-
avare montras vortojn en kunteksto; sinonimoj
kaj referencoj al la verkoj de Zamenhof abunde
troviĝas.

JEN VORTARO kaj por KOMENCANTO
kaj por SPERTULO.

Prezo: 25 ŝilingoj (afranko 1 ŝilingo)

Mendu: ĉe la eldonisto,

BRITA ESPERANTISTA ASOCIO
140 Holland Park Avenue,
LONDON W. 11,
Anglujo.
aŭ ĉe Esperantaj Libroservoj.

Germana Esperanto-Revuo

— aktuala, informa kaj instrua —
estas interesa gazeto ankaŭ por vi!

Abonprezoj:	1 jaro	14,20 GM
	1/2 jaro	7,20 GM
	3 monatoj	4,— GM

Mendu tuj ĉe

GERMANA ESPERANTO-ASOCIO

Postfach 2113
85 Nürnberg 2 Germanujo
Pĉk. Nürnberg 25 65

aŭ ĉe Universala Esperanto-Asocio
(Libroservo),

Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando
Pĉk. 37 89 64.



Teksto: "Por la
Internacia Lingvo
— kontraŭ lingva
diskriminacio" —
"Jaro de Homaj
Rajtoj".

MEMORIGA GLUMARKO

por la Jaro de Homaj Rajtoj 1968

Uzu ĝin vaste dum la tuta jaro!

Koloroj: ora, oranĝa, malhelblua.

Prezo: 0,50 gld. por 10 markoj. Eldono de UEA.



Unesteno

Universala Esperanta Stenografio

Neprafo por ĉiu

Mondo, Rothstr. 7, CH-8057 Zürich

Antaŭ la Universala Kongreso en Hispanujo...

nepre legu: VIVO KAJ ARTO DE GOYA

de Agostinho da Silva. 24 p. 17,5 x 13 cm.,
kun 10 ilustraĵoj kaj bibliografio.

Prezo: 0,50 gld. plus afranko. Libroservo UEA.

"Reĝo Lear faras decidan antaŭpaŝon en la
kampo de la viva dramo."

A. D. Foote en British Esperantist

"La fideleco, al kiu la tradukinto celis, estas
plene atingita, kaj al tio nenio estas oferita el
la majesta poezio de la originalo."

D. B. Gregor en Heroldo

"Neniu franca traduko povas atingi la altan
gradon de ekzakteco trovebla ĉe la Kalocsay-a
traduko."

Robert Martin en Franca Esperantisto

"Kalocsay pruvis ankoraŭfoje sian majstrecon.
Mi havas la impreson, ke Reĝo Lear estas lia
atuto."

William Auld en la revuo Esperanto

REĜO LEAR

Tolbindita: 16,50 gld.

Broŝurita: 14,— gld.

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 47-jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 18 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaĵ Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: \$ 4,50 (62 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

ESPERANTO: A NEW APPROACH



William Auld, M.A., D.B.E.A.

*Member of the Esperanto Academy
Principal Teacher of English at Grange School, Alton*

ELDONIS: **HEROLDO**

**La plej moderna lernolibro de Esperanto
por angle parolantoj!**

14 lecionoj kun ŝlosilo por memlernantoj.
Literaturaj legaĵoj el la plumo de la plej
famaj Esperanto-verkistoj.
Vortareto Esperanto-angla.

Prezo: 1,20 \$ (8/7 ŝil.)

Ĉiu ekzemplero entenas rabatkuponon en valoro
de 0,30 \$ validan por aĉeto de "Fabeloj" de
H. C. Andersen, vol. IV (trad. D-ro L. L. Zamen-
hof).

W. AULD instruas Esperanton laŭ nova didaktika
metodo, nome laŭ la ecoj de la internacia lingvo
mem kaj ne laŭ la strukturo de la angla lingvo.
Aĉetu ĉe via Libro-Servo aŭ ĉe U.E.A.